

1984 decembro

77a jaro



n-ro 948 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Jubileanta Auld faras la unuan
kontribuon al Jubilea Kolekto de UEA**

Vi trovos,

ke ni ĉi-foje regalias vin per numero, kiu grandparte temas pri libroj kaj revuoj. Informemuloj certe aparte interesiĝos pri la hungara libro *A világnyelv* (vidu paĝon 202). Aliflanke aperas iom malpli da recenzoj ol kutime. Kiel vi malkovros, io ankoraŭ pli interesa ol la jarindekso tion necesigis. La decembra numero krome signalas, ke jam estas tempo pripensi la farojn de la nuna jaro kaj demandi sin pri eventualaj plibonigoj en 1985. En multaj landoj ekzistas la kutimo utiligi la okazon de la jarŝanĝiĝo por fari al si promesojn. Tion la redaktoro evitos, almenaŭ publike. Li tamen volonte ricevos seriozajn proponojn kaj kontribuojn por la revuo (kvankam respondi al ĉiu ne eblos). Antaŭdankon. Al tiuj, kiuj festos en la venontaj semajnoj, agrablajn tagojn.

Enhavo

- 201 Okaze de la Zamenhofa Tago: Senrivala trezoro da poeziaj juveloj (Gaston Waringhien)
- 202 Lingvosciencistoj pri mondlingvaj problemoj
- 203 Landa agado: Analizoj kaj planoj en Ĉinio (Dai Songen)
- 204 Fakaj revuoj: Nova revuo pri komputado (Zyun'iti Sibayama); Dudekajaroj da orientaj studoj en Esperanto
- 205 Junularo: Aliĝu al la 41 IJK
- 206 Kongresoj: La 20a kataluna kongreso; Abunde raportita kongreso; Korespondi kun afrikanoj (H. Bakker)
- 207 Kulturo kaj Edukado: Publika klerigado kaj teatro en Budapeŝto
- 208 Libroj: La sorto de privataj Esperanto-bibliotekoj (Bernard Golden)
- 209 Kongresa Komunikado (novaĵoj pri la 70a Universala Kongreso)
- 210 **Recenzoj:** *Katoj kaj ĉevaloj* de Adalberto Huleš (G. Berveiling); *La ora Pozidono* de Julian Modest (K. Schubert); *Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton* de Deck Dorval (R. Cash); *La mondo de Tibor Sekelj* T. Sekelj/A. Károly (R. Rossetti); *Ĉu ni vere helpas la trian mondon?* de Glyn Roberts/Gaïta Robert (D. Besseghini)
- 212 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 213 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 214 Nekrologoj
- 215 Indekso pri la 77a jarkolekto de la revuo *Esperanto*
- 218 Anoncoj pri lingvistikaj postenoj
- 220 Anoncetoj

La kovrilo

Kunfestas la aperon de la verko, kiun recenzas nia ĉefartikolo, – *Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981* – kaj la ĉi-jaran sesdekan datrevenon de ties redaktinto, William Auld, unu el niaj plej gravaj literaturistoj. Ĉar temas pri kolekto de la plej bona originale verkita poezio en la Internacia Lingvo, ĝi devus troviĝi sur la librobretaro de ĉiu serioza esperantisto. Aliflanke la rekonenda realo estas tia, ke multaj ne emas legi eĉ la plej altkvalitajn poemojn. Se vi estas pli proza ol poezia, valoras pripensi la fakton ke *Esperanta antologio* estas elstara ankaŭ per sia informa valoro.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Graven-dijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tōkyō, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Senrivala trezoro da poeziaj juveloj

La 15a de decembro estas la 125a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. De 1927, laŭ la iniciato de Julio Baghy, la Esperanto-movado ĉiujare festas tiun daton ankaŭ kiel la Tagon de la Libro. Ni celebras la Tagon per recenza artikolo de profesoro Gaston Waringhien pri la nove aperinta kolekto de originala poezio Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981, redaktita de William Auld. Ĝia publikigo estas elstara evento en la kultura evoluo de la Internacia Lingvo.

Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981, red. William Auld (1924). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984 (2a eld.). 12+888p. Ilus. 22cm. Bind. Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 1. ISBN 92 9017 030 1. Prezo: 60,00 gld.

En mia kvina libro de eseoj (*Kaj la ceter' – nur literaturo*) unu havas la titolon “De unu antologio al alia”: tie mi detale komparis *La liro de la esperantistoj*, kompilitan en 1893 de Antoni Grabowski, kaj la *Esperanta antologio*, kompilitan en 1958 de William Auld, tiele ilustrante la amplekson de ellaboriĝo kaj disvastiĝo de Esperanto en la daŭro de 65 jaroj: el la burĝona “*Liro*” kun 160 dozenaj paĝoj kaj 23 originalaj poemoj de 10 aŭtoroj, ĉiuj slavaj, floradis la “*Antologio*” kun 648 oktavaj paĝoj kaj 385 poemoj de 90 aŭtoroj el 30 landoj.

Kaj nun, 26 jarojn poste, aperas la dua eldono de tiu *Esperanta antologio* de la sama William Auld. La unua eldono estis jam impona libro per sia dikeco, presperfekteco kaj interna riĉeco – la nuna estas ankorau pli impona pro la samaj kvalitoj: 888 paĝoj kun 706 poemoj de 163 aŭtoroj (inter ili 24 virinoj) el 35

landoj tra la kvin kontinentoj, kaj ĝi inde ricevis la numeron unuan en tiu Jubilea Kolekto, per kiu UEA decidis konsekri la Jarcenton de Esperanto.

La unua eldono entenis poemojn aperintajn inter 1887 kaj 1957, la dua kondukas nin ĝis 1981. Sed estus eraro kredi, ke la kompilinto limigis sin je aldono de 57 poetoj verkintaj dum tiuj lastaj 26 jaroj. Li konscie reviziis siajn unuajn elektojn, eĉ petante la helpon de kompetentaj amikoj, kiel Reto Rossetti, tiel ke la nuna verko aspektas grandparte nova.

El la periodo antaŭ la unua mondmilito, estis aldonitaj ne malpli ol 14 poetoj, inter kiuj Moses Goldberg, Kenĵi Ossaka, Vasilij Eroŝenko, Paŭlo Balkányi; eĉ du, pri kiuj li avertis en la Enkonduko de la unua eldono, ke li vane serĉis unu ilian poemon sufiĉe freŝaspektan, Marie Hankel kaj Clarence Bicknell, trovis akcepton en la dua eldono, probable ĉar Auld deziris, ke lia panoramo de tiu epoko estu historie kompleta.

Por la intermilita periodo, kiu prezentas iel la klasikan parton de nia poezio kaj tial estis jam juste kaj ĝuste antologiita, Auld bezonis aldoni nur tri nomojn, Stefanĉič, Velebit kaj Živanović, tri el Jugoslavio. Kompense, la elekto de la plej konataj estis funde refarita: de Julio Baghy el 15 poemoj nur sep estis konservitaj kaj 14 enmetitaj; de Raymond Schwartz, el 12 poemoj kvar estis forigitaj kaj sep aldonitaj; kaj el la aliaj la citoj estis ofte plimultigitaj: Ito Saburo ricevas kvin pliajn poemojn, Hilda Dresen kvin, Leonard Newell kvar, Ludmila Jevsejeva kvar; pri G.E. Maŭra ŝajnas eĉ ia reviviĝo: li pasas de du al 23 paĝoj!

Same okazas pri la tria periodo, komencita en 1945. Auld, sekvante la juĝon de amikoj, forferis



De maldekstre: niaj poetoj Eŭgeno Miĥalski, Kálmán Kalocsay, Raymond Schwartz kaj Hilda Dresen.

dek el siaj poemoj kaj aldonis 13; Marjorie Boulton gajnas ok paĝojn kun ok novaj poemoj, Sylla Chaves 14 paĝojn, Claude Piron kvin, Baldur Ragnarsson ok, Reto Rossetti ok, Edwin de Kock sep ktp. Sed precipe la nomoj de novaj poetoj (kelkaj el ili, ve! jam forpasintaj) sin trudas al nia atento: dum la antaŭvenintaj tenoroj, de Auld al de Kock, okupas kune 206 paĝojn, al ĉi tiuj postvenintaj estas dediĉitaj ne malpli ol 231 paĝoj. Inter ili ni retrovas kun plezuro Henri Vatré, Clelia Conterno, Gerald Jarvis, Victor Sadler – mi haltas, ĉar citi ĉiujn estas neeble kaj nur kelkajn nejuste; sed oni povas sen risko de misjuĝo kaj kun des pli granda praveco ripeti la aserton de Auld ĉe la unua eldono: "Mi estas certa, ke neniŭ poeto kaj neniŭ poemo elstare grava por la evoluo de nia literaturo mankas en la nuna volumo."

Ankaŭ la eksterpoeziaj partoj de la antaŭa volumo estis rearanĝitaj: la longa Enkonduko malaperis kaj estis anstataŭita de pli modesta Postparolo: tion klarigas, ke la tie aluditaj demandoj estis pli funde traktitaj en aliaj verkoj de Auld (*Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* kaj *Facetoj de Esperanto*); la biografioj estis kompletigitaj kaj laŭokaze ĝustigitaj (bedaŭrinde oni rezignis pri la indiko de la – proksimuma – prononco de tiuj ofte malfacilaj nomoj), kaj la fina enhavtabelo estas ordigita alfabete laŭ la aŭtoroj (tiel ke oni ne scias, ĉu la tuto estis ordigita laŭ la kronologia ordo de la aŭtoroj aŭ de iliaj unuaj verkoj). Forigitaj estas kaj la Glosaro kaj la Notaro, ambaŭ tamen tre utilaj (eĉ se la unuan iel senutiligis la *Neologisma glosaro* de Vatré – sed ne ĉiuj disponos ĝin oportune dum la legado).¹

Tiel detalan priskribon mi ne hezitis prezenti, ĉar mi deziris atentigi pri la zorga, jarojn longa penado, kiun tia elektado kaj kolektado postulis de Auld, kaj ankaŭ akcenti de tiu unuaranga verko la nekontesteblan gravecon, kiu baldaŭ evidentiĝos interne de la movado kaj ekstere de ĝi. Interne, pro tio ke tiu libro liveros al la vers-amatoroj senrivalan trezoron da poeziaj juveloj (el kiuj multaj, kuŝantaj en elĉerpitaj aŭ neakireblaj volumoj, restus el la atingo eĉ de fervoraj legantoj), sed precipe pro tio, ke ĝi donos al la esperantista publiko rimedon ekkoni nian poezian tradicion kaj iel nian propran kulturon; ĉar, kiel klarvide sentencis Auld en sia Postparolo: "Kulturo esperantista ekzistas, sed ĝin ĉiam minacas disfalo pro manko de celkonscia eduka aparato"; kaj ne pli oportunan kaj efikan kulturbazon oni povus imagi, ol ĉi tiun Antologion. Al la dubantoj, cetere, mi konsilus simple relegi kaj pripensi la citaĵon de T.S. Elliot, kiun ili trovos en mia ĉi-supre aludita eseo.

Ekstere de la movado, jena volumo estos la plej potenca rebato al la ĉie rampanta antaŭjuĝo, ke Esperanto, tiu "artefarita" lingvo, ne kapablas transdoni la intimajn sentojn de la homa koro. Ke tiom da poetoj el tiom da landoj preferis Esperanton al sia

naskiĝa lingvo, por vortigi la plej nevortigeblan parton de la animo, jen okulfrapa pruvo de la esprimvaloro de Esperanto. Ne gravas, se ne ĉiuj poemoj estas egalvaloraj: ilia ekzisto mem sufiĉe laŭte parolas. Nia ĉefa devo estas nun utiligi tiun atuton en la propagando ĉe la intelektaj medioj.

UEA deklaras sur titolpaĝo, ke la "Jubilea Kolekto" konsistos "el verkoj, kiuj formas kulturan fundamenton de la Internacia Lingvo", kaj anoncas la publikigon interalie de *Nova Esperanta krestomatio* kaj de nova eldono de la *Enciklopedio de Esperanto*. Se al tiuj verkoj oni aldonas la *Plena ilustrita vortaro* kaj la *Plena analiza gramatiko*, oni povas senerare rekoni en tiu kunaĵo la kvin kolonojn de la hom-historia monumento, sur kies frontono Zamenhof gravuris sian gloran nomon.

Gaston Waringhien

1 Pli mirinda estas, ne la malapero, sed la neutiligo de la "Korektendo" de la unua eldono! El la 14 korektoj tie montritaj, nur 4 estis efektivigitaj en la dua eldono. Mi opinias fari servon al la uzantoj, transportante la ceterajn 10 por la nova eldono. Do:

Paĝo	Linio	Legu:
37	7	Multefoje
149	1	Senpena
171	-2	per transportantaj
208	-8	homaj:
265	-4	Ne timu, knab',
272	-4	en blankaj floksoj
324	13	libro-paĝo.
354	13	Kaj kie
361	-9	kapo flaros
407	-13	l'edzinon (jes, ĉe botisto la ŝuo...)

al kio mi aldonu la korektojn montritajn de E. Borsboom en *Literatura foiro* (junio 1984): la antaŭnomo de Deij estas Leendert, kaj p. 377 post la 13a verso elfalis jena: "Halt'! Nu, kial vi ne tuj rapidas?"

Lingvosciencistoj pri mondlingvaj problemoj

Ĉi-jare aperis en Hungario ĉe la eldonejo Gondolat preskaŭ 500-paĝa libro, kiu titoliĝas *A világnyelv* (La mondlingvo). Ĝi estas speco de lingvistika antologio pri mondlingvaj problemoj, kaj ĝia apero ŝajnas al ni tiel grava evento, ke ni resumas tiuteman artikolon de Vilmos Benczik (el *Hungara vivo*, n-ro 5/1984).

La redaktoro de *A világnyelv* estas László Antal, konata hungara lingvisto, kaj unu el la reviziintoj de la manuskripto estis István Szerdahelyi. La libro estas dividita en naŭ sekciojn: Bezono de internacia pera lingvo – malnovaj peraj lingvoj, Ĉu iu el la naturaj lingvoj?, Miksitaj lingvoj, Konscia formado de naturaj lingvoj, Ĉu la artefarita lingvo estas homunkulo?, Kia

estu la strukturo de la artefarita lingvo?, Teorioj pri la formiĝo de la estonta mondlingvo, Bone – sed kio okazos al la artefarita lingvo poste?, El la historio de la artefaritaj lingvoj.

Sub ĉiu sekcio oni prezentas opiniojn de mondfamaj lingvistoj. La usona lingvosciencisto Edward Sapir, analizante la anglan, konstatis, ke la simpla morfologio faciligas la lernadon nur komence, kaj por tiu facileco oni multe pagas poste. Otto Jespersen demonstras, ke inter la etnaj kaj artefaritaj lingvoj ekzistas ne kvalita sed nur laŭgrada diferenco: en ambaŭ specoj de lingvo troviĝas kaj naturaj kaj artefaritaj elementoj. Walter Tauli refutas nesciencajn, mistikajn konceptojn pri la lingvo. Gustav Meyer vidas nevenkeblajn praktikajn problemojn en la vojo al plena akcepto de artefarita internacia lingvo. Baudouin de Courtenay konstatas: "Ĉiu lingvo estas 'morta' por ni, ĝis ni alproprigas ĝin, kaj ĉiu lingvo

fariĝas 'viva', se ni enigas ĝin en nian kapon." Karl Brugmann rekomendas al la adeptoj de la artefaritaj lingvoj klopodi enkonduki la lingvon iom post iom. Mahomet Isaev samopinias. Antal komentas, ke li opinias neebla la disvastigon de artefarita lingvo pere de la lerneja instruado, ĉar tio ordinare estas senefika.

A *világnyelv* ne celas prilabori la tutan vastan problemaron, sed prezenti rilatojn inter la lingvoscienco kaj la internacie uzataj (precipe artefaritaj) lingvoj. Ĝi ne juĝas nek aŭguras, sed konstatas, ke la historio ankoraŭ ne elektis el la multaj teoriaj ebloj, kaj tial la diskuto ankoraŭ longe daŭros plu.

Estas grave, ke esperantistoj en aliaj landoj atentigu nacilingvajn eldonejojn pri ĉi tiu tradukinda hungara verko: *A világnyelv; Pro és kontra*, red. Antal László. Budapeŝto: Gondolat, 1984. 481p. ISBN 963 281 319 7.

LANDA AGADO

Analizoj kaj planoj en Ĉinio

La 29an de aŭgusto komenciĝis en Pekino la kvin-taga 3a Ĉina Laborkunveno de Esperanto. Malfermis la kunvenon 88-jara Hu Yuzhi (Hujucz), vicprezidanto de Ĉina Popola Kongreso (la ĉina parlamento),

Foto: Hai Feng



Ge Baoquan (dekstre), prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, salutas Hu Yuzhi, prezidanto de ĈEL.

kiu estas ankaŭ la prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj membro de Honora Patrona Komitato de UEA. La inaŭguron ĉeestis ankaŭ Chu Tunan, vicprezidanto de Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun

Eksterlando kaj prezidanto de la societo Amikoj de Esperanto, Hu Sheng, konstanta komitatano de Ĉina Popola Kongreso, fama erudiciulo kaj veterana esperantisto, Ye Laishi (Ĵelezo) kaj Chen Yuan, vicprezidantoj de ĈEL, kaj Liu Xiliang, vicedirektoro de Radio Pekino.

La celo de la kunveno estis resumi la enlandan movadon dum la kvin jaroj post la 2a Ĉina Laborkunveno en 1979, interŝanĝi spertojn kaj diskuti kiel bone disvolvi la agadon kaj kiel sukcese prepari la Universalan Kongreson, kiu okazos en Pekino en 1986. Li Naixi, ĝenerala sekretario de ĈEL, raportis pri la evoluo de la enlanda movado. Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, raportis i.a. pri la 69a Universal Kongreso en Vankuvero kaj invitis ĉiujn lokajn Esperanto-organizaĵojn de la lando kontribui sian forton al sukcesigo de la unua Universal Kongreso en Ĉinio.

La kunvenantoj konstatis, ke la situacio, en kiu nun troviĝas la ĉina Esperanto-movado, estas senprecedenca kaj vere kuraĝiga. Oni jam fondis 15 provincnivelaĵojn Esperanto-asociojn, kaj esperantistoj en ankoraŭ ses provincoj preparas sin por establi ĉiu sian asocion. De post 1979 ni vaste diskonigis Esperanton kaj la movadon al la ĉina publiko pere de diversaj amaskomunikiloj kaj havigis pli da amikoj kaj simpatiantoj. Ĉiam plimultiĝas la nombro de homoj, kiuj volas lerni Esperanton. Por ilin kontentigi, ni aranĝis diversformajn Esperanto-kursojn. Por trejni kompetentajn instruantojn, ĈEL funkciigis tri plentempajn porinstruistajn kursojn dum tri sinsekvaj jaroj, kaj nun iras la kvara. Oni reeldonas la tradician Esperanto-gazeton *La mondo*, kiu fariĝis bona amiko de esperantistoj kaj komencantoj kaj certgrade kvieti-

gas ilian soifon je legaĵoj. Laŭ ĝisdata informo, nun troviĝas ĉirkaŭ 150 mil Esperanto-lernantoj tra tuta Ĉinio. Ĉio ĉi metis tre solidan bazon por la estonta evoluo de la movado en Ĉinio. Grave kontribuis la fortaj subteno kaj helpo de diverslokaj registaraj instancoj.

La ĉeestantoj emfazis, ke por efike varbi novajn lernantojn, necesas unue nutri per la idealo, kiun Esperanto portas en si mem, kaj ke troigo de la praktika valoro kaj utilo de la lingvo estas malkonsilinda.

La informo, ke la 71a Universala Kongreso definitive okazos en Pekino, tre ĝojigis la partoprenantojn. Ili opiniis, ke la UK, antaŭ la centjara jubileo, vekos pli grandan intereson ĉe la publiko. Ĝi povos antaŭenigi la enlandan movadon kaj havigos bonan ŝancon lerni de alilandaj esperantistoj.

Konsiderante, ke la lingva nivelo de ĉinaj esperantistoj ĝenerale estas nealta, la kunvenantoj akcentis, ke dum la venontaj jaroj unuavice gravos altigi la lingvan nivelon, precipe la parolan nivelon. Necesas kaj

urgas laŭplane kaj laŭpaŝe trejni en diversaj lokoj esperantistojn kun bazaj scioj de la lingvo.

Dum la diskutoj multaj partoprenantoj proponis okazigi en la venonta aŭgusto la unuan ĉinan kongreson de Esperanto, "UK-eskan", por akiri organizan sperton kaj revui la esperantistan vicaron de Ĉinio. ĈEL principe akceptis la proponon kaj la Esperanto-Asocio de la provinco Junano kandidatiĝis por inviti la kongreson al sia ĉefurbo Kunming.

En la fermo Zhang Qicheng nome de ĈEL premiis la Esperanto-asocion de Chengqing pro ĝia elstara agado, per Trofeo Fyne, kiun la Estraro de UEA pasintjare aljuĝis al Ĉina Esperanto-Ligo.

Diversaj amaskomunikiloj informis pri la laborkunveno, i.a. la influhavaj Ĉina Centra Televido, Ĉina Centra Radiostacio, la novaĵagentejoj Xinhua (Nova Ĉinio) kaj Ĉinio, *Renmin Ribao* (Popola ĵurnalo) kun eldonkvanto de 5 milionoj, *Guangming Ribao*, *China Daily* kaj la pekina vesperĵurnalo. La usona novaĵagentejo Associated Press of America plusendis la informon de Xinhua.

Dai Songen

FAKAJ REVUOJ

Nova revuo pri komputado

La komputilo hodiaŭ enpenetras la vivon ĉie, eĉ en lavmaŝino, dum ties funkcio ne estas de ĉiuj konata. Por la plimulto de homoj la komputilo restas kiel "nigra kesto". Tial scio pri tiu ilo estas dezirinda, eĉ se oni ne okupas sin pri tio fake. Ŝajne tia koncepto motivas la Komputistan Grupon de Hungara Esperanto-Asocio – la eldonanton de la nova trimonata revuo *Internacia komputado*. Ili celas vastan publikon, akcentante mikrokomputilojn pli ol pli grandajn maŝinojn.

Duono aŭ pli de ĉiu numero 64-paĝa traktas specialan temon: jam "retojn" kaj "tekstoprilaboron" kaj estonte "datumbazon" (informaron) kaj "programar-krizon". La resto, krom reklamoj, konsistas el informoj pri novaj produktoj kaj aplikoj, aŭ eseoj pri la komputilo kaj homo aŭ socio – eĉ fikcie.

En la gazeto ne estas tro fakaj artikoloj, nek cirkvitodesegnoj nek programo-dokumentoj. La nivelo estas tia, kia troveblas en fakaj paĝoj de bonkvalita ĵurnalo aŭ kleriga revuo.



Al mi, fakulo en privata komerca entrepreno, aparte interesaj estis artikoloj pri la situacio en orienta Eŭropo kaj en evoluantaj landoj. La plimulto de la abonantoj, laŭ la redakcio, tamen ne estas fakuloj. Mi kredas, ke la vario en la informoj utilas, sed mi samtempe sentas, ke tiu vario donas nur disan impre-

son, dum oni ne klarigas la sekretojn de la "nigra kesto". Hodiaŭ, informita homo scias, ke sen programo komputilo estas nura kesto, sed la nocio pri, ekzemple, "operaciaj sistemoj", kiel *CP/M* kaj *Unix* – pri iliaj kunvivo kaj konkurenco – ne estas klara. Aŭ, kio estas la diferenco inter "komputil-lingva kompilumilo" kaj "interpretilo"? Mi dezirus pli da superrigardaj artikoloj pri tiaj bazaj konceptoj. Tio ne estas malebla kun la nuna redaktoro kaj la reto de kontribuantoj.

La redakcio faras lingvan kontrolon, sed faklingve la nivelo estas intermikso de juveloj kaj ŝtonaĉoj, ne ĉiam konsekvencaj. Ekzemple, "poruzanta funkcio"

Foto: Zoltán Fejér





(el la angla *user function*) ne decas esti "uzanta funkcio" (= funkcio, kiu uzas ion), sed ambaŭ esprimoj troveblas. Laŭ mi, oni en la nuna situacio apliku la principon "cent floroj disfloru", kaj la terminoj travivintaj la konkurencon fariĝu la solida bazo por la estonteco. Tiusence, podio por terminologia debato, ĉu en ĉu ekster *Internacia komputado*, estus bonvena.

Mi kredas, ke konatiĝo kun la mondo de la komputado pere de ĉi tiu internacia gazeto, ankaŭ grafike plaĉa, alportos al la legantoj novan komprenon kaj scivolon pri la vasta tereno de la hodiaŭa komputado.

Oni povas aboni al *Internacia komputado* per la Libroservo de UEA kontraŭ 24 guldenoj aŭ ĉe multaj landaj perantoj, de kiuj troviĝas plena listo sur la interna flanko de la kovrilo de *Jarlibro 1984*.

Zyun'iti Sibayama

Dudek jaroj da orientaj studoj en Esperanto

Primitinda fenomeno estas *Biblia revuo*. Esperantaj periodaĵoj ofte malfacile prosperas kaj des pli Esperantaj periodaĵoj pri nepopularaj fakaj temoj. *Biblia revuo* ekaperis en 1964 sub la redakto de Donald Broadribb, profesoro pri semidaj lingvoj en la Universitato de Melburno, Aŭstralio. Ĝi ĉi-jare festis sian dudek-jaran datrevenon sub la redakto de akademiano D.B. Gregor el Britio.

Biblia revuo estas trimonata internacia gazeto de ĉirkaŭ 32 paĝoj en proksimume formato A5, kiu science traktas bibliajn kaj orientajn studojn. Ĝi ne limigas sin al bibliaj temoj, sed jam en 1969 aperigis artikolojn pri aspektoj de la islamo. En 1982 aperis la unua artikolo pri budhismo. Krom altnivelaj artikoloj, oni publikigas recenzojn de libroj kaj rubrikon de mallongaj novaĵoj. Alia laboro de la redakcio estas publikigi tradukojn kaj komentariojn pri tradukoj de gravaj tekstoj. De 1975 felietone aperis en la paĝoj de la revuo "Biblia vortaro". Tiu atentinda ter-

minara laboro atingis sian literon Z en la tria ĉi-jara numero.

Oni povas aboni al *Biblia revuo* kontraŭ 18,00 gld. ĉe Libroservo de UEA aŭ ĉe la eldonanto Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj, ĉe s-ro Antonio Gambuti, Piazza Duomo 4, I-48100 Ravenna, Italio.

JUNULARO

Aliĝu al la 41a IJK

La 41a Internacia Junulara Kongreso (IJK) venontjare okazos de la 22a ĝis la 29a de julio en Eringerfeld, FR Germanio. Administre Eringerfeld apartenas al la urbo Geseke, ĉe la fervoja linio Dortmund-Paderborn, en la federacia lando Nordrejn-Vestfalio. La vilaĝon Eringerfeld dominas impona kastelo de la 16a jarcento, kaj ĉirkaŭas belega kamparo kaj travagindaj arbaroj.

La kongresejo estos moderna, facile atingebla internulejo, en kiu la kongresanoj loĝos en riĉe ekipitaj unu- kaj dulitaj ĉambroj. La 25-metrojn longa naĝejo kaj giganta gimnastikejo estos uzeblaj dum la IJK (ne devige!).

Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1985 Internacia Junulara Jaro, do la IJK esploros la problemojn, kiujn frontas la hodiaŭa junularo. Se vi interesiĝas pri tiu vasta problemaro, venu al Eringerfeld por trakti ilin sur internacia nivelo en laborgrupoj, diskutoj, prelegoj ks. Estos ankaŭ sporta laborgrupo, kiu fine de la kongreso aranĝos feston kun nekutimaj sportiloj kaj ludoj. La kamparo invitos al granda komuna migrado tra la arbaro kun pikniko.

Krom la tradiciaj programeroj, kiel interkona, teatra, internacia kaj adiaŭa vesperoj, okazos interalie rokmuzika koncerto de la grupo "La mondanoj" el Berlino kaj ekskurso al cementfabriko. La Loka Kongresa Komitato intence ne organizas tradiciforman tuttagan ekskurson, dum kiu aŭtobusoj portas kongresanojn al turismaĵo.

Ses tagojn post la IJK okazos la Universala Kongreso. Por tiu periodo eblos aliĝi al granda bicikla karavano al Aŭgsburgo.

Aparte notinde estas, ke la kotizoj de la venonta IJK estos proksimume nur du trionojn de tiuj en la pasintaj kelkaj jaroj. La jenaj kotizoj en germanaj markoj validas ĝis la 15a de januaro: personoj ĝis 21-jaraj pagas 150 GM, ĝis 25-jaraj 170 GM, ĝis 35-jaraj 250 GM, pliaĝuloj 310 GM. La kotizoj inkluzivas la loĝadon, manĝojn kaj partoprenon en ĉiuj aranĝoj. Post la 15a de januaro la kotizoj altiĝos. Aliĝilojn kaj pliajn informojn donas Germana Esperanto-Junularo, Postfach 101422, D-2000 Hamburg 1, FR Germanio (poŝtĉekkonto 1316 90-754 en Karlsruhe).

La 20a kataluna kongreso

De la 12a ĝis la 14a de oktobro 205 personoj partoprenis en la 20a Kataluna Kongreso de Esperanto en Olot, Katalunio, Hispanio. Inter ili estis 20 eksterlandanoj el Belgio, Francio, Italio, Nederlando, Rumanio, Pollando kaj Usono.

En la kongresa Honora Komitato estis Jordi Pujol, prezidanto de Katalunio, Miquel Coll i Alentorn kaj Arcadi Calzada, prezidanto kaj unua vicprezidanto de la Kataluna Parlamento, kiu alparolis la kongresanojn en la oficiala fermo, Joan Rigol, ministro por kulturo kaj Pere Macias, urbestro de Olot.

La kongreso aparte traktis etnajn problemojn en Ameriko. Direktite al Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, la

Kataluna Parlamento, UEA kaj la landaj asocioj de UEA en Centra kaj Suda Ameriko, la rezolucio de la kongreso kondamnis la ankoraŭ ekzistantan subpremadon de amerikaj etnoj.

Dum la kongreso okazis la 24aj Internaciaj Floraj Ludoj, ĉe kiuj festparolis d-ro André Albault, prezidanto de Akademio de Esperanto. La unuan premion gajnis Giorgio Silfer (Italio) per sia originala poemo "Sur la plaĝo de l' ciklopo".

Kursojn de Esperanto gvidis i.a. s-ino Audrey Childs-Mee, funkciis bone provizita libroservo, kaj oni inaŭguris en la urbo novan straton: Avenuo d-ro Zamenhof. Kongresaj poŝtaĵoj ricevis specialan poŝtstampon.

La venontjara Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en S. Cugat del Vallès.

Abunda reeĥo

De la 18a ĝis la 20a de aŭgusto ĉirkaŭ 180 personoj ĉeestis la 71an Kongreson de Japanaj Esperantistoj en Morioka, nordorienta Japanio. Inter ili estis ankaŭ deko da eksterlandanoj. Kvankam la nombro de kongresanoj estis malpli ol kutime – eble pro la iom longa distanco de la tradiciaj centroj de la japana Esperanto-movado – la kongreso estis notinda pro sia ekstermovada informado.

La regionaj amaskomunikiloj atente kaj abunde raportis pri la kongreso, precipe lige al la eminentuloj Kenzi Miyazawa, poeto, kaj Inazô Nitobe, scienculo kaj internaciisto, ambaŭ tiuregionanoj, kiuj ligiĝis kun la Esperanto-movado.

Inter la prelegoj estis "El mia sperto pri eldonigo de *Kumeŭaŭa* en la japana versio" de s-ino Makiko Hukunaga, "Lastatempaj agadoj de UEA antaŭvide al la Centjara Jubileo" de Yosimi Umeda, "Kion mi travivis en Korea Respubliko kun esperantistoj" de Charles Rowe kaj "Miyazawa Kenzi kaj Esperanto" de Yasutarô Nozima. La por publikaj prelegoj estis "Du aktualaj problemoj en FR Germanio" de Dieter Kleemann kaj "Miyazawa Kenzi, geniulo en lingva lernado" de Hideki Itaya.

Dank' al la gazetara informado, partoprenis 36 urbanoj en la unutaga kurso de Esperanto. Ili krome aŭskultis publikajn prelegojn kaj spertis la vivan uzadon de la lingvo.

Kiel kutime, abundis fakaj kunvenoj, ĉi-foje i.a. de radioamatoroj, sciencistoj, komputistoj, membroj de UEA, virinoj kaj anoj de MEM.

Inter la distraj programeroj estis manĝado de loka speco de vermiĉela supo en formo de konkurso. Ĝin gajnis la vicprezidanto de UEA, Yosimi Umeda, per forgluto de 107 bovletoj da supo!

La venontjara Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazos en Yokohama de la 23a ĝis la 25a de aŭgusto.

Korespondi kun afrikanoj

Kiel komisiito de UEA pri la afrika agado, mi ofte ricevas petojn de afrikanoj, kiuj tre deziras rilati kun homoj el aliaj kontinentoj. La korespondado estas por ili la sola maniero havi kontaktojn kun alilandaj esperantistoj. Tre gravas por ili fidela, ofta, amika interŝanĝado de leteroj. La poŝto tamen estas tiel malakurata, ke povas daŭri monatojn ĝis venos respondo, kaj ne malofte leteroj tute perdiĝas. Tial oni devas konservi kopiojn de siaj leteroj, kaj fari fotokopion por la okazo se la letero perdiĝos.

La afrikaj lernantoj, izolitaj, studante nur perletere, ne havas facilan vojon por lerni la lingvon. Tial ilia lingvaĵo ofte estas neperfekta. Vi povas – se ĝentile kaj stimule (ne kritike) – helpi plibonigi la lingvo-uzon. Kaj skribu mem en senerara, simpla, klara Esperanto. Malfacilajn vortojn evitu kaj, se la korespondanto estas komencanto, traduku al koncerna ekskolonia lingvo.

De tempo al tempo aperas korespondpetoj de afrikanoj i.a. inter la anoncetoj en *Esperanto*. Se ekestos kontakto, mi volonte ricevos informon pri la evoluo (s-ro H. Bakker, Kastelestraat 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando). Nur tiel mi povas ĝisdatigi mian administradon, kiu servas por konduki kaj subteni la afrikajn lernantojn.

H. Bakker



ARTO KAJ EDUKADO

Publika klerigado kaj teatro en Budapeŝto

La fino de marto 1985 estos aparte aktiva tempo por la esperantistoj de Budapeŝto. De la 22a ĝis la 26a de marto okazos jam por la tria fojo en tiu urbo grava manifestacio de Esperanta teatra arto: Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Dum la kvin tagoj oni prezentos entute sep teatraĵojn en la teatrejo Radnóti. Ili estas *Betoterapio* de J. Elem, *Letero al la akademio* de Franz Kafka, *Johano la Brava* (pup teatra prezentado) laŭ Sándor Petőfi, *La damo de l' fatalo* (komedio) de L. Tabi, *Tri viroj en la neĝo* de E. Kästner, ludota de Bulgara Esperanto-Teatro, kaj *La lasta magnetofonbendo de Krapp* de Samuel Beckett. Krome estos revua programero fare de ĉiuj aktoroj.

Biletoj por la teatraĵoj aĉeteblas en la librovendejo de Hungara Esperanto-Asocio (HEA). El ek-

sterlando oni turnu sin al Turisma Komisiono de HEA, Pf. 193, H-1386 Budapest, Hungario, kiu povos rezervi lokojn en i.a. malmultekostaj tranoktejoj. Se oni deziras ankaŭ aliajn turismajn programe-rojn en Budapeŝto, bonvolu skribi al Esperanto-Sekcio de Turisma Oficejo Express, Szabadság tér 16, Budapest 5, Hungario.

Paralele kun la teatra festivalo, Kultura Komisiono de HEA kaj Asocio de Hungaraj Klerigistoj okazigos konferencon pri publika, do eksterlerneja kaj nedevisa, klerigado. La konferenco, kiu komenciĝos la 21an de marto kaj finiĝos la 25an, havos la temon "Sistemoj kaj modeloj de la publika klerigado".

Krom aŭskulti prelegojn kaj partopreni en diskutoj, oni havos okazojn viziti klerigajn kaj kulturajn instituciojn, inkluzive de prezentadoj en la 3a Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Tria evento, el kies prezentadoj aliĝintoj povos elekti, estos la samtempa Budapeŝta Printempa Festivalo.

Ankoraŭ eblas proponi al la konferenco prezenton de prelego. Oni aliĝu ĝis la 28a de februaro. Pliaj informoj haveblas de Kultura Komisiono de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

La sorto de privataj Esperanto-bibliotekoj

Ĉiu esperantisto, kiu dum sia aktivado en la Esperanto-movado, per granda penado kaj ne malpli granda elspezo de mono, sukcesis kunmeti valoran aron da libroj kaj revuoj, devas pripensi la sorton de tiu kolektaĵo post sia forpaso. Se ne estas alia esperantista familiano aŭ parenco, kiu deziras transpreni tiun hejman bibliotekon, la plej konvena solvo estas fari aranĝon kun publika aŭ universitata biblioteko, kiu testamente ricevos la tutaĵon kaj certigos, ke estontece la libroj kaj revuoj estos konsulteblaj same kiel aliaj verkoj en la institucio.

Kompreneble, la elekto de la ricevonta biblioteko estas grava, ĉar la donaconto devas informiĝi, ĉu en la nova tenejo la kolektaĵo ricevos bonan traktadon laŭ bibliotekistika vidpunkto. Ne havas sencon transdoni privatan bibliotekon al malgranda loka biblioteko, kie, pro manko de bretpaco kaj personaro, la libroj kaj revuoj restos en kestoj, deponitaj en la kelo. Por eviti tiun sorton, estas konsilinde kontrakti sufiĉe frue kun la ricevonta institucio pri transpreno kaj estonteca konservado de la privata biblioteko. Antaŭ nelonge mi informiĝis pri tia aranĝo, kiun mi priskribas ĉi-sube.

Dum la pasintaj jaroj mi havis la kutimon akiri librojn en Esperanto per interbiblioteka prunto de Hungarlanda Esperanto-biblioteko en la urbo Szeged, kiu funkcias kiel parto de la urba biblioteko Somogy. Antaŭ kelkaj monatoj revenis miaj petslipoj kun la klarigo, ke pro translokado de la biblioteko, ne eblas pruntepreni librojn. Mi do rezignis pri mia esplorprojekto ĝis la remalfermo de la biblioteko. Sed iom poste, neatendite alvenis paketo kun la tri petitaj verkoj. Ili estis ekspeditaj de la Nacia Széchény-Biblioteko en Budapeŝto. Akompanis la librojn multobligita folio, klarigante, ke la libroj apartenas al la privata biblioteko de la konata hungara librokolektanto Károly Fajsz. Tiu informilo efektive estas la oficiala raporto de bibliotekisto de la Nacia Biblioteko, kiu inspektis la librokolektaĵon de s-ro Fajsz okaze de lia peto, ke lia biblioteko estu deklarita protektita, t.e. ke la Nacia Biblioteko respondecu pri ĝi. Du motivoj estis prezentitaj: 1. por malhelpi disiĝon de la privata biblioteko post la morto de la posedanto, 2. ĉar sekve de nova dekreto pri lumono, la posedanto ne povas surprizi la pagon de luprezado de granda loĝejo, necesa por lokado de la enorma kolektaĵo.

La biblioteka fakulo taksis la kolektaĵon de Károly Fajsz vere unika kaj konforme al ĉiu kriterio

bezonata por deklaro de protekto. La priskribo de la konsisto de la biblioteko ja estas impona: pli ol 5 000 libroj, preskaŭ 4 000 jarkolektoj de periodaĵoj, proksimume 1 000 fotoj, multenombraj afiŝoj, broŝuroj, bildkartoj, manuskriptoj, krom objektoj kiel medaloj, flagoj, memorŝildoj, diplomoj ks. En unu el la kvar ĉambroj estas malgranda librobindejo. Kun la helpo de pensiita bibliotekistino katalogo estas preparata por eventuala publikigo. Cetere, fotokopioj estas farataj de raraj, ne plu akireblaj libroj, ricevitaj per interbiblioteka prunto. La biblioteko ĉiam estas je la dispono de esploristoj, kiuj povas konsulti la librojn surloke; ankaŭ la Nacia Széchény-Biblioteko turnas sin al ĝi por Esperantaj libroj.

La inspektinta bibliotekisto rekomendis, ke la biblioteko de Károly Fajsz estu deklarita protektita kaj ankaŭ, ke lumona suplemento estu pagita por la ĉambroj aldonaj al la unuaj du. Kompreneble, nur tre elstara privata biblioteko povas akiri tiel favoran traktadon de nacia institucio. Ja estas evidente, ke ties fakuloj agnoskas la valoron de celkonscie kunmetita kolektaĵo de Esperantaj libroj, revuoj kaj memoraĵoj. Hodiaŭ Károly Fajsz ne devas zorgi pri la sorto de sia hejma biblioteko, kiu kun leĝa protekto transiros en posedon de la Nacia Biblioteko de Hungario, kie ĝi estos je la dispono ne nur de enlandaj sed ankaŭ de eksterlandaj esploristoj. Tiu konsultado estos fa-



ciligita post eldono de la katalogo, sed eĉ nun la libroj ne staras sur bretoj, kolektante polvon; kiu bezonas libron en tiu biblioteko, povas prunte akiri ĝin.

Kiom da privataj bibliotekoj en Esperantujo povas sekvi la vojon de la biblioteko de Károly Fajsz?

Bernard Golden



Kongresa Komuniko

**70a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Aŭgsburgo (FR Germanio)
3-10 aŭgusto 1985**
**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**
**Adreso de LKK: Seitzstr. 14,
D-8900 Augsburg, FR Germanio.**

Loka Kongresa Komitato: En la pasinta komuniko ni neglektis mencii la plenan konsiston de LKK. Pri artaj aranĝoj respondecas s-ro J. Ipfelkofer, la infanan kongreseton prizorgas s-ino Irene Hohn, kaj LKK bonvenigas la kunlaboron de la prezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, s-ro Joachim Giessner, pri fervojaj aferoj.

Kotizoj: Ĉiuj aliĝkotizoj laŭ la unua kotizperiodo devas atingi la konstantan adreson antaŭ la fino de decembro. Poste la kotizoj estos jene laŭ la kategorioj: kat. 1: 188 gld., kat. 2: 156 gld., kat. 3: 125 gld., kat. 4: 94 gld. Vidu difinojn sub Kongresa Komuniko en la oktobra numero de *Esperanto* (p.169) aŭ sur la aliĝilo mem. Aliĝiloj haveblas de la supraj adresoj aŭ de landaj perantoj.


Infana Kongreseto: La aliĝkotizo por la 22a Internacia Infana Kongreseto (IIK) estas 190 gld. (nur por germanoj, 170 GM). Aliĝiloj kaj kondiĉoj de aliĝo haveblas de la supraj adresoj kaj de landaj perantoj. La aliĝkotizo inkluzivas ĉiujn manĝojn, restadon dum unu semajno kaj la tutan programon. La koston de la IIK subvencios la Universala Kongreso mem.

Inter la kondiĉoj, estas aparte menciinde, ke la IIK estas rezervita por infanoj ses- ĝis 13-jaraj. Infanoj kun nesufiĉa lingvoscio ne estas akcepteblaj. Oni povas peti subvencion el la kaso Adoptaj Gepatroj.

Reklamoj kaj salonmendoj: Kiel kutime, la UK jam dissendis inviton al diversaj instancoj, kiuj antaŭvideble deziros reklami en la kongresaj eldonaĵoj aŭ mendi salonon aŭ budon en la kongresejo.

Se vi ne ricevis tiujn cirkulerojn, sed ja volas aperi reklamon aŭ mendi salonon, bonvolu tuj kontakti la konstantan adreson.

Loĝigo: Jam en la Unua Bulteno aperis indiko pri la prezoj de loĝeblecoj en Aŭgsburgo. Ekde tiam LKK ne ĉesis esplori la plej favorajn eblecojn kaj nun sukcesis aldoni al la antaŭe anoncitaj lokoj. Ĉefe temas pri malaltekostaj loĝlokoj en junulara tranoktejo kaj eklezia internulejo. Plenaj detaloj aperos en la Dua Bulteno, sendota al aliĝintoj jarfine. Oni emfazas, ke la loĝkondiĉoj estas malpli liberaj ol en normala hotelo, kaj necesos respekti certajn regulojn.



La Kongresejo de Aŭgsburgo, kun la distinga "vojmontrilo" Hotelturo en la fono.

Aldone estas bona tendumejo kaj ruldomo, ekipita per varmega akvo, duŝejoj, elektra kurento ktp. Por kongresanoj el landoj kun transpagaj problemoj LKK esperas povi havigi kelkajn malaltekostajn pensionojn.

Vizoj por FR Germanio: La UK aŭtomate sendas invitleterojn al esperantistoj, kiuj sendas aliĝilon el certaj landoj, kun la celo faciligi la akiron de elirvizo. Por pliglatigi la akiron de enirvizo por enveturi FR Germanion, LKK jam sendis informojn pri la Universala Kongreso al pli ol 20 ambasadoj en FR Germanio kun instigo rapidigi la trakton de vizopetoj.

Iu ajn kongresano, kiu spertas malfacilojn, rajtas kontakti la konstantan adreson por peti plian helpon.

Statistiko: Ĝis la komenco de novembro aliĝis 298 homoj el 43 landoj. Antaŭvideble, la plej granda nombro el unu lando venas el FR Germanio: 51, poste Nederlando 27, Francio 22, Belgio 17, Hungario 15, Britio 13, Bulgario kaj Usono po 12, Japanio, Jugoslavio kaj Kanado po 11 kaj Svedio 10.

Tre persona sono

Katoj kaj ĉevaloj, Adalberto Huleŝ (1926). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 80p. 20cm. ISBN 963 571 100 X. Prezo: 12,00 gld.

Jen poemaro en kvin partoj: Antikvo, Homa kanto, Ploro por la Medium Aevum (= mezepoko), Notaĵoj de iu pasaĝero, Katoj kaj ĉevaloj. La aŭtoro ne jam reprezentigas en la nova *Esperanta antologio*, kaj tion oni fakte nur povas bedaŭri. Lia tre persona sono estus inda kontribuo al la Esperanta simfonio.

Precipe la partoj "Homa kanto" kaj "Ploro" miaopinie estas tre sukcesaj: tie sentiĝas varma kompato pri la homa sorto, pri senesperigo pro mankinta amo, pri disiĝo (vidu la grandiozan "Hezita monologo"), pri infanaĝaj memoroj ktp. Ne senkiale li mem konstatas, ke "Ununura objekto ekzistas: la vivo./Pri tiu ĉi mi parolas/je obstino mania –/alian direndon/mi ne havas." (p.16).

Granda parto de la poemoj estas verkitaj en pli-malpli moderna formo, kvankam je onia miro troveblas eĉ la praformo de la heksametro. Sed ĉi-forma moderna neniel estas ĝena por la komprenebleco. La vortelektado ne estas la plej forta flanko de la aŭtoro: precipe foje iom mirigas nepoeziaj vortformiĝoj kiel "belegeco" aŭ "tranĉemeco" (p.19). Aliflanke adasismojn li scias bone eluzi por elvoki certan arkaikecan etoson en "Kanto el la deksesara jarcento". Sed sian ĉefan atingon la verko nepre havas en la diritaĵoj mem; eĉ, postlegade pluhantis min kelkaj bildoj tiel trafe vortitaj de unuopa poemo jen tia jen alia. Ekz. tiu homo, kiu "iras senhalte, per paŝoj samritmaj. Ĉu tagojn? Ĉu semajnojn? Ĉu dum jarcentoj?" – ero el poemo, kiu parolas la homsorton kun ĉiuj ties doloroj kaj sencperdiĝoj, ("Homo sur la rondstrato", p.37). Post tiu ĉi poemkolekto oni nur povas esperi, ke Huleŝ trovos la eblon kaj la inspiron verki plu; nian literaturon tio nepre pliriĉigus.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Distra triangulo

La ora pozidono, Julian Modest (pseŭd., 1952). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 68p. 20cm. ISBN 963 571 132 8. Prezo: 8,10 gld.

"Dez. kor. ĉ.l.ĉ.t." Ĉi tiel verŝajne komenciĝis la dramo, kiun Modest observas tra la okuloj de juna bulgara ferianto ĉe la strando de la Nigra Maro. La tuto estas neniel eksterordinara: Juna profesie sukcesa edzo el supraklasa familio ferias kun sia

edzino, kiu dankas sian karieron al lia influa familio. La tria kunferianto estas lia pli juna korespondaminkino, esperantistino el Francujo, kies patro (Kion alian okcidenta patro povus fari?) posedas fabrikon. La tradicie virrola edzo kompreneble flirtas kun la junulino, dum la rakontanto amas jen tiun, jen la alian virinon, sed distance kaj plejparte sindetene, se kredi lian propran ateston. La tension tenas, ke la leganto dekomence scias pri la mistere okazonta senspura malapero de unu el la rolantoj.

Modest verkas en facila, sed lerta stilo kaj aranĝas sian rakonton fakte pli interesa ol mia resumo kredigas. HEA ĉi-foje presis bonkvalite, sen tro da eraroj. Rekomendinda libreto, se vi serĉas distran legaĵon por kelkaj horoj. Ĝi taŭgas por progresantoj.

Sur paĝo 20 aperas recepto kiel devigi homon lerni Esperanton.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Klasikeca krimromano

Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton, Deck Dorval (pseŭd.). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1983. 190p. Ilus. 21cm. Prezo: 25,20 gld.

Ne, ne temas pri faklibro pri jaĥtoj, kvankam tie ĉi vi lernos kelkajn fakvortojn kiel "pavezo" aŭ "rigi" – tre necesajn je aĉeto de via sekva jaĥto. Vi certe komprenis, ke temas pri krimromano. Ja, kaj kia krimromano!

Kaj kio okazas en ĝi? Kio do ne okazas en ĝi? En tiu ĉi libro estas dudek sep ĉapitroj, kaj en ĉiu vi trovos po unu surprizon. Laŭsekve vin regalos atenco, surpriza konfeso, murdo ŝajnigita sinmortigo, sinmortigo ŝajnigita murdo, murdo per pafo, murdo per striknino, falsaj indicoj, ŝtelo de indicaj dokumentoj, ĵaluzo, malĉastaĵoj, borskrizo, amfuĝo – ĉio okazas en ĉi tiu romano krom la mondo fino!

Tamen temas pri tute klasika romano laŭ la "kiu-ĝin-faris?"-stilo de Agatha Christie, pri enigmo solvota de la inspektoro – kaj de la leganto, se tiu zorge legos kaj notos ĉiujn indicojn. Jen vi troviĝas en fermitejo – jaĥto surmara –, kun stereotipa rolularo: financegisto, riĉuloj, grafino, muzikisto, kuracisto, ŝakmajstro, amoremulino, la ŝipanaro, angla ĉambristo kaj tuthazarde... policinspektoro. (Cetere, ĉiuj parolas Esperanton krom la angla "ĉembristoŭ".) La inspektoro frontas serion da krimoj solvendaj sen ekstera apogo. Teorie, se vi povos scii kaj kontroli ĉies kieon dum la tempo de la krimo, tiu kiu ne havas alibion estos la kulpulo. Kun la inspektoro vi sekvos la indicojn sur vojeto prisemita je mortintoj. Kaj kiel li mem diras: "Se la veturo ankoraŭ daŭros iom, ni atingos Marsejlon kun kargo da kadavroj." La kuracisto devas nekropsii la korpojn preskaŭ antaŭ ol ili malvarmiĝas.

Nu, tie ĉi vi ne serĉu valanan psikologion. Vi serĉu nur rapidpafan rakontadon per vigla lingvaĵo (preskaŭ senriproĉa), kaj mekanikan kribron de la puzleroj. En ĉi tiu romano ĉiuj suspektindas. Kiu do krimis? – Eble via hundo...

Rikardo Cash (Francio)

Admirindaj gravuraĵoj

La mondo de Tibor Sekelj, red. Tibor Sekelj (1912). Subotica: (Jugoslavio): Eldona Sekcio de EES, 1983. ĉ. 250p. (nenumeritaj). Lignogravuris Andruskó Károly. 5cm. Bind. Prezo: 30,00 gld.

Kvin binditaj volumoj: Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko, Oceanio, ĉiu kun kvar-paĝa enkonduko kaj po 150 tutpaĝaj lignogravuroj de Andruskó Károly. Ja mem la priskribo ŝajnas impona. Eble impresos eĉ pli la fakto, ke temas pri liliputaj volumoj, formato 5×4,5cm., ĉiun kontinenton garnas 240-vorta prologo, kaj por detale gvati la poŝtmarke grandajn gravurojn tre utilas lupeo.

Nu ankaŭ la miniatura arto estas ŝatinda. Oni povas abunde admiri la pejzaĝojn, konstruojn, homojn ĉe laboro aŭ en festa kostumo, kapojn deproksime ktp. – des pli sorĉite, ke mankas ĉia titolo aŭ lokindiko por la koncerna kontinento.

Sed entute: verki 700 lignogravurojn estas laboro herakla, kaj omaĝinda estas la artisto Andruskó



Károly. Kaj simila provoko estis la celo karakterizi ĉiun kontinenton en la strikta kadro de kvar paĝetoj. Amatoroj de miniaturaj libroj, ekatentu do! Kaj certe ankaŭ la amikoj de nia mondvaga esploristo kaj antropologo volonte salutos lian novan elpaŝon.

Reto Rossetti (Britio)

Kiel ekonomie rilati al la Tria Mondo

Ĉu ni vere helpas la trian mondon? Glyn Roberts. El la angla trad. Gaïta Robert. Laroque Timbaut: Laŭte, 1984. 60p. Ilus. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Prezo: 4,50 gld.

Ĉi tiu verko apartenas al la malofta speco de tiuj politikaj pamfletoj, kiuj sukcesas esti sintezaj kaj samtempe bone ekipitaj per konkretaj ekzemploj. La aŭtoro estis dum multaj jaroj evolu-helpanto en la Tria Mondo kaj sin direktas al la homoj, kiuj volas havi similajn spertojn. Li unue prezentas la "liberalan" kaj "socialisman" vidpunktojn pri ekonomia (sub)evoluo, klare subtenante la duan sen misprezento de la unua. Li montras, kiel de tiuj du vidpunktoj devenas du diversaj ideoj pri "helpado" al la Tria Mondo.

La celo de la broŝuro estas pruvi per konsekvenca rezonado, ke la nuntempa ideo pri evolu-helpantoj – fontanta el la liberala pensmaniero – utilas por konservi la nunan mondan ekonomian ordon. Tio estas, ke la industriigita centro ŝuldas sian riĉecon al sistema ekspluatado de la triamonda periferio, kiu provizas la krudmaterialojn. Oni vidas de tio konkretajn ekzemplojn, kiuj pruvas, ke malgraŭ eĉ la plej bonaj personaj intencoj la "ekspertoj" neniam sukcesas kontribui al rompo de tiu sistemo. Tute male, eĉ sufiĉas ilia fizika ĉeesto por malfortigi la tradician kulturon de la triamondanoj, tiel senigitaj de sia nura armilo.

La konkludo ŝajnas esti do, ke plej bone la "ekspertoj" restu en sia lando kaj tie laboru por la starigo de socialisma socio, uzante ne revoluciajn, sed paŝpost-paŝajn metodojn. Laŭ la aŭtoro, nur tia socio garantios per si mem la liberigon de la Tria Mondo.

Oni ne trovas malfortajn punktojn en la rezonado. Se oni volas kontraŭstari la tezon, oni devas ataki la deirpunkton, nome ke la triamonda subevoluo havas la samajn kaŭzojn kiel la malriĉeco en la industria landoj. Cetere, la multaj skemoj kaj distingo prezentitaj en la teksto estas tre utilaj ankaŭ por alidirekta argumentado. Modela estas, ekzemple, la traktado de la fizika, la ekonomia kaj la kultura povoj, klare difinitaj kaj montritaj per ekzemploj.

Laŭ mia opinio la libro bone montras la afrikan situacion, sed ne la pli komplikajn kazojn de Azio kaj Latinameriko, fakte malmulte menciitajn. Krome la ĵus subskribitaj "akordiĝoj de Nkomati" inter Mozambiko kaj Sudafriko komencis novan fazon en la rilatoj inter la afrikaj ŝtatoj, kio – almenaŭ ĉi-rilate – iom malaktualigas la libron. Mi esperas, ke baldaŭ estos tradukitaj en Esperanton aliaj simil-tezaj verkoj, kiujn mi konas en diversaj naciaj lingvoj.

Dario Besseghini (Italio)

Laste aperis...

Albumo pri Ĉinio. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 96p. Kolorilus. Mapo. 25cm. 85-Es-175P. Plenkolora bildlibro, montranta multajn aspektojn de la lando kaj vivo de Ĉinio. Prezo: 8,40 gld.

Bonkora Ŝjaudon, Mej Jing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 65p. Kolorilus. de la kompilinto. 21cm. 88-Es-204P. Bildfabelo por infanoj. Prezo: 4,80 gld.

Datumbazoj, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64p. Ilus. 24cm. N-ro 3 de *Internacia komputado*. ISBN 963 571 136 0. Dudek unu popularaj artikoloj pri komputilaj datumbazoj; kun mallongaj novaĵoj kaj listo de novaj eldonaĵoj. Prezo: 7,50 gld.

Elprovado de l' amo, Antun Šimunić (1948). El la kroata trad. Lucija Borčić. Osijek: Esperanto-Societo "Liberiga Stelo", 1984. 18p. Ilus. de V. Džanko. 21cm. Dialoga poemaro de kroata poeto, kiu verkas ankaŭ Esperante. Prezo: 7,50 gld.

En novan mondon; Rektmetoda kurso por geknaboj, Vilma S. Eichholz. Bailieboro (Kanado): Esperanto Press, 1984. 384+74p. Ilus. 21cm. ISBN 0 919186 17 3/21 1. Sep-kajera kurso kun rakontoj, teatraĵoj, ludoj ks., plus Esperanto-angla vortareto. Prezo: 48,00 gld.

Feliĉa birdo, La; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 49p. Ilus. 18cm. 10-Es-1866P. La tria libreto de popolrakontoj el Ĉinio. Prezo: 2,40 guldenoj.

Język międzynarodowy (1887), Doktoro Esperanto (pseŭd. de L.L. Zamenhof, 1859-1917). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1984. 40+2p. 20cm. ISBN 83 7013 004 6. Fotorepreso de la unua lernolibro de Esperanto por poloj. Prezo: 19,80 gld.

Kolorigu, div. kompilintoj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 108p. Kolorilus. 21cm. 88-Es-205P. Ses parte koloraj kajeroj pri bestoj kaj floroj kune en skatolo, por kolorigo fare de infanoj. Prezo: 12,30 gld.

Mirinda libro, La; Omaĝe al nia samideano Ramón Molera kaj festi la 75an datrevenon de UEA. Barcelono: Barcelona Esperanto-Centro, 1984. 63p. Ilus. 21cm. Kolekto de la premiitaj noveloj el Internacia Literatura Konkurso "Ramón Molera" (1923-1983), kun biografio. Prezo: 7,20 gld.

Mondo de Tibor Sekelj, La, red. Tibor Sekelj (1912). Subotica (Jugoslavio): Eldona Sekcio de EES, 1983. ĉ. 250p. (nenumeritaj). Lignogravuris Andruskó Károly. 5cm. Bind. Kvin aparte binditaj miniaturaj kolektoj de lignogravuraĵoj pri Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo kaj Oceanio, kun enkonduko de T. Sekelj. Prezo: 30,00 gld.



Poeto ne mortas, František Kožík (1909). El la ĉeĥa trad. Jiří Karen. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1984. 31p. Ilus. 21cm. Antologio el la verkaro de fekunda, multflanka verkisto kaj esperantisto; kun biografio. Prezo: 1,80 gld.

Pri literatura kritiko, Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 70p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantolo-

gio 11. Sekcioj: Pri la alta kritiko, La kritiko super la lingvo, Nia recenza kritiko, La kritiko super la instrumentoj de la lingvo kaj pri la ideologio de Esperanto; kun antaŭparolo de Karolo Piĉ. Prezo: 21,60 gld.

Retoj, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64p. Ilus. 24cm. N-ro 1 de *Internacia komputado*. ISBN 963 571 134 4. Dudek popularaj artikoloj pri komputilaj informretoj sub sekcioj Teknika bazo, Komputilo kaj homo kaj Mikrokomputiloj; kun mallongaj novaĵoj kaj listo de novaj eldonaĵoj. Prezo: 7,50 gld.

Słownik esperancko-polski, Andrzej Pettyn (1937). Varsovio: Polski Związek Esperantystów, 1984. 172p. Mimeo. 20cm. ISBN 83 7013 000 3. Vortaro de ĉ. 5 mil serĉvortoj kun plej ofte unuvortaj ekvivalentoj; tabeloj de afiksoj kaj mallongiĝoj. Prezo: 13,20 gld.



Suferoj de la juna Werther, La (1774), Johann W. von Goethe (1749-1832). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Heckendalheim: Eld. Berthold Faber, 1984. 92p. Ilus. 22cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 19. ISBN 3 923228 99 6. Tipo de la sentimentala romano, verkita en formo de leteroj, per kiu Goethe akiris internacian famon, aparte inter la tiutempa junularo; antaŭparolo de Baldur Ragnarsson; inda grafika prezento. Prezo: 48,60 gld.

Teksto-prilaboro, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64p. Ilus. 24cm. N-ro 2 de *Internacia komputado*. ISBN 963 571 135 2. Dudek ok popularaj artikoloj pri komputila tekstoprilaborado sub sekcioj Komputilo kaj homo, Maŝina tradukado kaj Mikrokomputiloj; kun mallongaj novaĵoj kaj listo de novaj eldonaĵoj. Prezo: 7,50 gld.

Vortaro de Esperanto (1911), Kabe (pseŭd. de Kazimierz Bein, 1872-1959). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 175p. 22cm. Bind. La unua ampleksa Esperanta-Esperanta vortaro (kun ĉ. 5 mil artikoloj), kompilita de la plej granda stilisto de la unua periodo de la Esperanta literaturo. Prezo: 18,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Azio:** Ne malpli ol tri mil japanajn gejunulojn Ĉinio oficiale invitis viziti Pekinon, Ŝanhajon kaj Hangzhou de la 24a de septembro ĝis la 3a de oktobro. Inter ili estis kvin junaj esperantistoj: Hiroshi Saitō, Ken'itirō Watanuki, Humihiko Kanō, s-ino Yuri Sakamoto kaj Hiroyuki Usui, kiuj renkontiĝis kun ĉinaj esperantistoj.

● **Brazilo:** Lastatempe vigliĝis la Esperanto-agado en norda Brazilo. Unu el la plej prestiĝaj ĵurnaloj de Belém, *A Província do Pará*, regule publikigas rubrikon pri Esperanto, prizorgatan de Alberto Milhomens. En majo oni fondis

novan societon en Santarém. *Amazonia esperantista adresaro* diskonigas ĉirkaŭ 70 adresojn en 20 urboj.

● **Kanado:** La informkampanjo antaŭ la Universala Kongreso en Vankuvero liveris inter junio 1983 kaj junio ĉi-jare tra Kanado 33 ĵurnalajn artikolojn, 23 ĵurnalajn intervjuojn, 80 leterojn de legantoj, 57 komunajn bultenojn, 4 radio-komunikojn, 26 radiajn intervjuojn, 4 televidajn intervjuojn, 31 leterojn al parlamentanoj, 23 leterojn al multkulturaj asocioj, 4 prelegojn, 6 ekspoziciojn, 7 kursojn kaj i.a. du novajn Esperanto-klubojn.

via klubo deziras esti simile malavara kaj "adopti" la Esperantan agadon en afrikando, kontaktus-ron H. Bakker, Kastelestr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando.

● **Matematiko:** Aperis ĉe Instituto pri Matematiko de Universitato de Oslo 27-paĝa Esperanta traktaĵo de prof. Olav Reiersøl, *Diferencialaj ekvacioj de samplaraj distribuoj* (ISBN 82 553 0556 4). Oni ne vendas la kajeron, sed matematikistoj, stokistikistoj kaj Esperanto-bibliotekoj povas ricevi senpagan ekzempleron de la aŭtoro: Prof. Olav Reiersøl, Torødveien 109, N-3135 Torød, Norvegio.

● **Paco:** Aldone al numero 34 de la bulteno de UEA *UN kaj ni*, aperis en Esperanto la ok-paĝa traduko *Deklaro de UN pri la preparado de socioj por paca vivado*. La bulteno estas mendebla de UEA kontraŭ duono de MJ-kotizo por dek numeroj.

● **Aŭtoveturado:** Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) preparis mapon de Eŭropo por helpi al la aŭtistoj, kiuj veturos al la Universala Kongreso en Aŭgsburgo. La mapo indikas ĉiujn urbojn, kie loĝas UEA-fakdelegitoj de IEKA kaj tiuj pri turismo, gastigado, SOS-aŭtoservo kaj aŭtaj aferoj. Pliajn informojn, kontraŭ internacia respondkupon, donas s-ro J. Guillaume, 66 De Grasse Village, F-78810 Feucherolles, Francio.

● **Bibliotekistoj:** Oni provas starigi Tutmondan Esperantan Bibliotekistan Asocion (TEBA). La celoj estas krei solidan bazon antaŭ la Centjara Jubileo de Esperanto, kunligi esperantistajn bibliotekistojn, diskonigi Esperanton pere de bibliotekoj kaj per Esperanto helpi la laboron de ĉiaj bibliotekistoj. Interesitoj, inkluzive posedantojn de privataj Esperanto-bibliotekoj, skribu al la provizora sekretario de TEBA s-ro Geoffrey King, 228 Capworth Street, London E10 7HL, Britio.

● **Ĉevalkurado:** Esperanto jam partoprenas en la "la sporto de reĝoj", ĉar en Britio vetkuras ĉevalo, kiu nomiĝas Esperanto. Posedata de la mondfama ĉevaltrejnisto Vincent O'Brien kaj taksita je valoro de du milionoj da pundoj, Esperanto finis la unua en sia unua konkurso. Ni tamen konsilas al vetemaj britaj esperantistoj riski sian monon je la venko de la lingvo, ĉar la ĉevalo lastatempe ne sukcesis tiel brile kiel antaŭe.

● **Evoluhelpo:** Ni citas el letero de Esperanto-Klubo de Norrköping, Svedio, al s-ro H. Bakker, komisiito de UEA pri afrika agado: "En la klubestraro ni diskutis la 'ĝemeliĝan aferon' kaj trovis, ke ni fakte ne multe faras tiurilate. Ni nur pagas la UEA-kotizojn por Capita (Kongo) kaj Tima (Angolo) kaj abonas por ili la gazeton *El popola Ĉinio*. Krom tio ni nur korespondas kun ili. Ni tute klare komprenas, ke UEA bezonas pli firman t.e. ekonomian helpon. Tial ni nun decidis, ke la klubo provos pagi ĉiujn viajn kostojn por Kongo kaj Angolo. Ni vidas, ke temas pri kelkcentoj da francaj frankoj jare." Se

● **Sciencfikcio:** En Los-Anĝeleso, Usono, okazis fine de aŭgusto la monda kongreso de sciencfikcio kun pli ol ses mil partoprenantoj. Inter ili estis du esperantistoj. Unu el ili estis la eminenta verkisto Harry Harrison, kies libro fariĝis la filmo *Soylent Green* (Soja verdaĵo), en kiu ludis la aktoro Charlton Heston. Harrison brile defendis Esperanton en forumo. En liaj verkoj roluloj ofte parolas Esperante. Forrest J. Ackerman, prelegis i.a. pri la ligo inter Esperanto kaj la ekkresko de la sciencfikcia movado, kiu grandparte komenciĝis en Los-Anĝeleso frue en la 1930-aj jaroj sub influo de Esperanto. Esperant-



● **Ĉinio:** Jen surstrata parto de kampanjo de la Esperanto-grupo en Wuhan (ĝemelurbo de Duisburg, FR Germanio), kiu en julio fondis "Esperanto-Instruktron". Per du kampanjoj ĝi sukcesis varbi ĉirkaŭ 470 kursanojn.

isto jam de 50 jaroj, Ackerman (alinome Forĵak) estas renoma redaktoro de la gazeto *Famous Monsters of Filmland* (Famaj monstroj de Filmlando), verkisto, filmaktoro, tradukisto, literatura agento, gajninto de la unua Premio Hugo.

● **Jubileoj:** Antaŭ dudek jaroj, je la 19a de decembro 1964, Radio Pekino elsendis sian unuan programon en Esperanto. En 1983 ĝi disaŭdigis 1 460 programojn en la Internacia Lingvo dum entute 730 horoj. Por la aktualaj ondolongoj kaj adreso de Radio Pekino, bonvolu konsulti nian konstantan radiorubrikon (p.120). En venonta numero, ni esperas aperigi specialan artikolon pri la historio de la Esperanto-Fako de Radio Pekino.

● **Tradukoj:** En la aŭstra urbo Klagenfurt (aŭ slovenlingve Celovec) aperis felietone dum 1983 en la slovenlingva gazeto *Nedelja* (Dimanĉo) traduko de *Vivo de Gandhi* (1967), originale verkita en Esperanto de Edmond Privat (1889-1962). En alia slovena gazeto, *Družina in dom* (La familio kaj domo), aperis felietone *La malsata ŝtono* de Rabindranath Tagore (1861-1941), tradukita el la Esperanta traduko (de 1961) de la bengala originalo. Ambaŭ tradukojn en la slovenan faris Vinko Ošlak. Nun krome okazas interparoloj ĉe du slovenlingvaj eldonejoj pri komuna publikigo de *Vivo de Gandhi*. Unu estas la konata eldonejo Mohorjeva. Oni esperas eldoni ankaŭ la slovenlingvan tradukon de *La malsata ŝtono* en libra formo.

● **Filmo:** Unuafoje Pola Televido elsendis, la 6an de novembro, filmon en Esperanto: *Angulo de Bona Espero*. Temas pri verko de la televida raportisto Roman Dobrzyński, filmita en la bienolernejo "Bona Espero" en Brazilo, dum profesia vojaĝo tra sudamerikaj landoj. La filmo ricevis la plej altan noton de la juĝkomisiono de Pola Televido, kiu jam sendis ĝin al la Filmfestivalo de Sevilla (Hispanio). Venontjare ĝi estos sendita ankaŭ al la festivalo de Leipzig (GDR).

● **Unesko:** Laŭ Unesko-dokumento 120 EX/1 de la 27a de septembro 1984, oni studas la dezirindecon kaj financajn sekvojn de eventuala enkonduko de la portugala kaj aliaj lingvoj en Uneskon kiel laborlingvoj. La laboraj lingvoj de Unesko nun estas la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa, dum la hindia kaj itala lingvoj estas nur oficialaj.

Persone

● **Forster:** D-ro Peter G. Forster, brita sociologo (Universitato de Hull), kies scienca verko *The Esperanto Movement* (1982) vekis atenton en kaj ekster la Esperanto-movado (vidu recenzon en nia numero de julio-aŭgusto), vojaĝis lastatempe al Tanzanio. Kvankam lia vojaĝo ne havis movadan karakteron, Forster kontaktis esperantistojn en Dar-

es-salamo kaj prelegis pri la Internacia Lingvo en la lingvistika fakto de la Universitato de Tanzanio. Antaŭe, Forster pasigis du jarojn en Malavio, kie li instruis ĉe la tiea universitato.

● **Yamamoto:** Antaŭ nelonge s-ro Sitarô Yamamoto, instruisto el Nagano, Japanio, ricevis la Kultureman Premion Kuruzima Takehiko. Oni aljuĝis ĝin pro lia agado por internacia edukado. Utiligante Esperanton, li de 1965 provizis kolegojn kaj lerneajn ekspoziciojn per materialoj el la tuta mondo.



● **Hilmar Ilton Santana Ferreira** (maldekstre sur la foto), 46-jara agrikultura inĝeniero el Itabuna, Brazilo, gajnis la premion en la UEA-konkurso por la Jubilea Simbolo, kiun oni nun komencas vaste utiligi tra la Movado. Dekstre sur la foto estas lia kolemino **Janett Lindo Ramos Freitas Ferreira**, sociologo, pri kiu ni eksciis, ke ŝi estis la teknika realiginto de la premiita simbolo. La duopo gajnis, aldone al la UEA-premio, ankaŭ 20 000 kruzajrojn de Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Nekrologoj

VLADIMIR KOMIDAR forpasis antaŭ iom da tempo en Ljubljana, Jugoslavio. Li tie estis fakdelegito pri federismo.

J.M. v.d. LUBBE mortis antaŭ kelka tempo en Amsterdamo, Nederlando. Li estis membro de UEA de 1951.

ROBERT MACKAY forpasis antaŭ nelonge en Edinburgo, Britio. Li estis membro de UEA de 1944.

C. NJANASATA MAHATHERO (1908—1984), budhisma monaĥo, forpasis la 25an de septembro en Dodan-

duwa, Srilanko. Li naskiĝis kiel Martin Novosad en Ĉeĥoslovakio, sed en 1938 transloĝiĝis al Cejlono. En 1954 li fondis Budhanan Esperanto-Instituton. En 1963 aperis lia anglalingva studo pri Esperanto en kaj ekster Srilanko kaj en 1978 la dua eldono de lia *La koro de l' budhismo*. Li estis dumviva membro de UEA kaj dum multaj jaroj delegito.

BARBARA M. PLATT forpasis la 13an de oktobro en Londono, Britio. Ŝi dum multaj jaroj sindone laboris en la oficejo de Brita Esperanto-Asocio kiel la helpsekretario kaj kontisto.

INDEKSO

Revuo *Esperanto* 77a jarkolekto numeroj 937-948

Abraham, G. 54
Administrado 84
Afriko 26, 67, 104, 206
Ahn Songsan 106
Albault, A. 29
Aplika lingvistiko 165
Ari, V. 32
Ariste, P. 182
Arkivoj 117
Auld, W. 13, 181, 201
Aŭkcioj 102, 158
Aŭtoveturado 213
Azio 67, 196, 213
Baghy, J. 201
Bakin 138
Bakker, H. 26, 206
Bardsley, C. 58
Barker, B. 43
Barković, K. 73
Baronnet, F. 79
Baur, A. 174
Belartaj Konkursoj 91, 155, 168
Belgio 36, 105
Belli, G.G. 73
Benczik, M. 176
Benczik, V. 202
Benedek, E. 176
Benino 26
Bernard, R. 72
Bertin, C. 14
Berveling, G. 33, 54, 210
Bessghini, D. 193, 211
Bezzina, M.F. 34
Bibliografio 16, 35, 74, 114, 134, 176, 194, 212
Bibliotekoj 77, 208, 213
Blinduloj 28, 126, 167
Boatman, D.P. 180
Bona Espero 10
Boniol, S. 155
Boulton, M. 77, 153, 171
Boyer, A. 139
Brabant, R. 155
Brajla literaturo 117
Bratoš, I. 200
Brazilo 57, 117, 162, 197, 213
Brennan, A. 194
Britio 43, 82, 107, 198
Broccatelli, U. 29
BSO 5, 218, 220
Buckley, F. 19
Bulgario 182, 197
Cansdale, G. 17, 112, 159
Cash, R. 11, 131, 211
Cavanagh, B.M. 37
CED 3, 97, 150, 163
Centjara Jubileo 2, 89, 118, 156, 201

Champy, E. 118
Chapman, H. 175
Chicot, E. 182
Cool, J.F. 54, 131, 154, 176
Cornice, D. 73
Corsetti, R. 181
Cosenza, B. 118
Ĉevalkurado 213
Ĉilio 36
Ĉinio 63, 104, 137, 178, 179, 197, 203, 213, 214
Dai Songen 204
Danvy, J-P. 22
Davies, H. 200
Delegita reto 84
Diego, F. de 54, 153
Diplomatoj 145
Disertacioj 77
Dobrzynski, Z. 139
Doršić, D. 139
Dorval, D. 210
Drajev, K. 78, 138, 183
Drees 138
Du Temple, W.G. 58
Duc Goninaz, M. 78
Dudich, E. 172
Eduka Fondaĵo Carson 110
Edukado 64, 207
Edwards, J. 155
Ekspozicioj 197
Eksteraj rilatoj 89, 115, 161
Ekzamenoj 91
Eldonado 85, 166, 178, 197, 202
Ellyard, S. 60
Esperantologio 36, 150, 178
Estrara Raporto 83-100
Evoluhelpo 213
Faka agado 28, 42, 44, 84, 96, 166, 178, 204
Fan Yizu 192
Fejér, Z. 155
Ferenczy, I. 37
Ferreira, H.I.S. 214
Ferreira, J.L.R.F. 214
Fervojistoj 108
Filippov, S.V. 118
Filmo 199, 214
Financo 85, 98-100

Finnlando 101, 197
Fondaĵo A. Grabowski 153
Fonduso Eroŝenko 127
Fondusoj 198
Formaggio, E. 176, 192
Forster, P.G. 132, 214
FR Germanio 18, 107, 116, 205
Francio 116, 125, 197
Frank, H. 118
Gabrielli, L. 173
Gesell, S. 113
Gessaga, N. 139
Gibczyńska, J. 154
Gieseler-Fischer, W. 78
Gim Chong-Wan 139
Golden, B. 12, 208
Goldman, T.A. 106
Gonin, R. 28
Goodheir, A. 14
Gorov, H. 19
Gregor, D.B. 32, 112
Greklando 36
Grigorov, A. 55
Guglielminetti, C.C. 25
Gutierrez Aduriz, M. 191
Ĝuĝev, S. 182
Haase, M. 74
Handikapuloj 178
Harlow, D.J. 191
Harry, R. 162
Hartl, J. 113
Härnqvist, K. 118
Heide, Z. 19, 174
Helias, P-J. 192
Herlufsén, S. 139
Hinda Unio 67
Hispanio 24, 137, 197, 206
Honora Patrona Komitato 83, 182
Honoraj Membroj 83, 182
Hortikuturo 117
Hosi, S. 15
Hu Yuzhi (Hujucz) 182, 203
Huleš, A. 210
Hungario 198, 202, 207
Ĥalil Ĝibran, Ĝ. 54
ILEI 166
Infankongreseto 88
Informado 18, 23, 58, 62, 89, 105, 123,



*Reaperis anglalingva raporto de la nederlanda firmao BSO, kiu okupiĝas pri Esperanto kiel pontolingvo en aŭtomata traduko: **Distributed language translation: feasibility study of a multilingual facility for videotex information networks** de A.P.M. Witkam, 1983, 370p., 30cm. Speciala prezo por la Esperanto-movado: 57,50 gld. plus sendokostoj (normala librovendeja prezo estas 127,50 gld.).*

138, 179, 184
 Inoue, Y. 138
 Instituto Hodler 86, 107
 Instruado 36, 64, 92, 101, 128, 163, 166, 178
 Int. Kong. Universitato 149
 Interlingvistiko 18, 36, 103, 178
 Ioannu, Ch. 193
 Irano 117
 Irlando 137, 197
 Italio 115, 126, 137
 Janheim, V. 67
 Janton, P. 125
 Japanio 57, 196, 197, 178, 206, 213
 Jiang Hongzhang 112
 Jubilea Fondaĵo 156
 Jugoslavio 12, 57, 117, 121, 126, 128, 178, 186
 Kalendaro 51, 168
 Kamrýt, S. 72
 Kanado 199, 213
 Karen, J. 8
 Kaukal, W. 118
 Károly, A. 211
 Keulen, J. van 19
 Kibernetiko 179
 Kinosita Zy. 133
 Kjuĉukov, N. 192
 Knappert, J. 73, 167
 Kníchal, O. 71, 167, 173
 Knoedt, L.H. 54, 56
 Koboré, J.B. 145
 Kock, E. de 123
 Kolker, B. 15, 73
 Kolombio 116, 137, 199
 Komidar, V. 214
 Komputado 5, 18, 36, 138, 167, 204, 218 220

Kongresoj:

UK 68a, Budapeŝto 88
 UK 69a, Vankuvero 46, 50, 88, 109, 141-157, 170
 UK 70a, Aŭgsburgo 169, 187, 209
 IJK 39a, Debrecen 88
 IJK 40a, Swanwick 30, 76, 158
 IJK 41a, Eringerfeld 205
 Koptilov, V.V. 28
 Kordobo, B. de (ps.) 15
 Korea resp. 57, 137, 196, 197
 Korespondado 206
 Korespondaj kursoj 77
 Koutny, I. 113
 Krtalić, I. 55

Kruusalu, V. 191
 Kultura Centro Esperantista 68
 Laborplano 83
 Landa agado 24, 84, 95, 203
 Lapenna, E. 12
 Lapenna, I. 185
 László A. 202
 Le Magadure, F. 192
 Lernejoj 138, 139, 178, 182
 Léger, J-R. 37
 Li Shijun 134
 Li Weilun 199
 Liao Zhigen 192
Libroj :

Angla-Ea telekom. vortaro 14
 Antologio de arg. noveloj 15
 Apliko de komputiloj 113
 Castigliano ... interling. 32
 Ĉu ni ... 3an mondon? 211
 Ĉu vi konas la Teron? 172
 Danĝera lingvo 57
 De Patronia al Ŝekspir 176
 Distr. Lang. Transl. 5, 218, 220
 Elektitaj sonetoj 73
 Elpafu la sagon 134
 Esperanta antologio 201
 Ea-rusa vortaro 58
 Esperanto Movement, The 132
 Etulaj aventuroj 174
 Faktoj kaj fantazioj 171
 Fundamenta krestomatio 58
 Gerda malaperis! 193
 Hist. Eo en Ĉeĥosl. 72
 Homa lingvo k komputilo 54
 Hungaraj fabeloj 176
 Iluzioj 53
 Internacia geedziĝo 77
 Jaĥto veturas for... 210
 Katoj kaj ĉevaloj 210
 Kiel bretono iĝis reĝo 192
 Kinderras, Het 13
 Kiuj semas plorante... 71, 167
 Krestomatio de Ea lit. 32
 Kroatia poezio 55
 Kunikloj de mia avo 173
 Laktisto de Mäeküla 191
 London kantas 193
 Malsata ŝtono 214
 Matenaj floroj... 131
 Materada 175
 Mediteme 173
 Mikrokomputiloj..., 113
 Mikronoveloj de S. Hosi 15

Mirakla insulo Baratario 113
 Mondo de Tibor Sekelj 211
 Ni vivos! 71
 Okayama no esuperanto 72
 Ora Pozidono 210
 Originala vortaro 77
 Paŝoj al plena posedo 58
 Printempa danco 34
 Privilegia vojo 58
 Rakontoj pri Afanti 112
 Retoromanĉoj..., La 174
 Romantika periodo, La 131
 Rompitaj flugiloj, La 54
 Saĝo-sako 192
 Salato 72
 Senlegenda biog. de LLZ 77
 Sep mil tagoj en Siberio 73
 Septembro estiĝos majo 192
 Sferoj-2 111
 Sferoj-3 191
 Skizoj ... bulgara mov. 72
 Sociekonom. de ekologio 33
 Sur la bordo 112
 Trombonoj de Jeriko 111
 Turo de l' popoloj, La 34
 Unuaj pioniroj en Bulg. 72
 Vespera gruo 133
 Vilaĝo Borovo 55
 Világnyelv 202
 Viveroj 54
 Vivo de Gandhi 214
 Vortaro Eo/svahila 73, 167
 Vortaro japana-Ea 77
 Zamenhof, patro de Eo 57
 Librokomerco 85
 Lindblom, R. 24
 Lindström, B. 118
 Lingva diskriminacio 178
 Lingvaj malplimultoj 149
 Lingvo kaj komunikado 121, 146, 198
 Lingvo-instruado 138
 Lins, U. 73
 Linz, E. 200
 Llech, J. 200
 Londona Eo-Horo 193
 Long, K. 16, 35
 Lorjak 53
 Lubbe, J.M. v.d. 214
 Lusin 131
 Mabesoone, J.M. 173
 Mackay, R. 214
 Maertens, G. 1, 142, 144
 Mallia, C. 34
 Malsato 117
 Malto 42, 116
 Marinov, H. 33
 Masterman, D. 170
 Matematiko 213
 Matuba, K. 15
 Matzinger-Benz, H. 60
 Maul, S. 167
 Membrostatistiko 39, 84
 Milojević, S. 41, 61, 142
 Mischler, K-H. 37
 Miyamoto M. 133, 183
 Mladenova-Hans, Z. 37

Bindilo aŭ Jarkolekto

Ni indeksis por vi la jarkolekton, sed tio ne diros al vi, kie troviĝas la bezonata revunumero. Ne eblas lasi unuopajn revunumerojn treniĝi tra la bretoj, tirkestoj, ĉambroj kaj jaroj. Jen du ideoj por solvi la problemon radikale:

Bele bindita jarkolekto kostas nun 36.00 (por Nederlando 37,80) gld., plus afranko. Atentu! Ni bindas nur tridek jarkolektojn, kaj la plimulto estas jam antaŭmendita. Bela bindilo el kvazaŭleda plasto, por teni en perfekta ordo la numerojn de la aktuala jaro. Prezo 9,00 (por Nederlando 10,71) gld., plus afranko. Triona rabato ekde 3 ekz.




En kontakto kun la mondo!

Nia vigla revuo *Kontakto* estas en kontakto kun la mondo. Mondo de junaj ideoj. 6-foje jare ĝi aperas kaj la kotizperantoj de UEA nun akceptas vian abonon por 1985 en via nacia valuto. Kursgvidantoj: ĝia simpla lingvaĵo helpas al viaj lernantoj progresi, petu informojn pri kolektivaj abonoj! Jam pli ol 1700 ekzempleroj dissendiĝas. Do, estu en *Kontakto*, kun la mondo.

Modest, J. 71, 210
Moerbeek, R. 127, 200
Montevideo 161
Movado 1, 2, 61, 151
Muzeoj 117
Müller, K. E. 4
Nakamura, T. 25
Naturistoj 178
Navigado 138
Nederlando 44
Nedkov, B. 72
Neergaard, P. 19
Nervi, M. 155, 168
Nguyễn Phước Trach 37
Nielsen, J.K. 37
Nikaragvo 197
Njanasata Mahathero, C. 214
Norvegio 137, 197
Nuez i Pérez, P. 78
Oficiala informilo 38, 58, 79, 140, 180, 199
Oka, K. 72
Oliveira Ludka, de P. 60
Osias, S. 139
Osolnik, B. 121
Paco 179, 213
Palacios, R. 139
Papozov, D. 72
Parlamenta agado 18, 43, 105
Periodaĵoj:
Biblia revuo 205
Esperanto 87
Esperanto-dokumentoj 87
Esperantologio 122
Internacia komputado 204
Petersen, H.W.R. 118
Petersson, H. 118
Pilger, W.F. 15, 55
Pinto do Carmo, J. de 78
Piron, Cl. 138, 193
Platt, B.M. 214
Poezio 123, 168, 197, 201
Pollando 41, 103
Porciúncua, D. 37
Porter, M. 78
Poŝtmarkoj 85, 118
Pral, C. 139
Pupteatro 77, 116, 185
Radio 18, 37, 40, 41, 117, 118, 120, 139,

179, 214
Raeva, L. 192
Ragnarsson, B. 45, 64, 172
Rajski, A. 60
Ranganayakulu, P.V. 34
Raszka, J. 139
Rašić, N. 122
Reagoj 29, 106, 167
Rehorić, Z. 126
Régulo Pérez, J. 183
Richardson, D. 133
Ritterspach, G. 108
Robert, G. 211
Roberts, G. 211
Rodríguez Castela, A. 54
Rokmuziko 136
Rooke, J.S. 200
Rossetti, R. 31, 71, 211
Rotkvić, I. 25
Röll, L. 190
Ruando 67
Rumanio 116, 137
Ryner, H. 34
Sadler, V. 10
Samimy, Badiollah 139
Samyn, A. 200
San-Marino 42
Sarandrea, G. 173
SAT 164
Saud-Arabio 62
Savir, M. 72
Schaltegger, J. 37
Schnell, R. 168
Scholze, G. 37
Schoultz, I. 23
Schubert, K. 34, 55, 174, 210
Schulz, R. 111, 176
Schulze, K. 37
Scienca Eld. Centro 96
Sciencfikcio 213
Sekelj, T. 118, 134
Serio Oriento-Okcidento 45, 134
Sherwood, B.A. 5
Shute, N. 112
Sibayama, Zy. 113, 192, 205
Sindikatoj 44
Sly, K.A. 60
Smilga, K. 46
Solá, P.A. 136

Sonntag, S.K. 4
Soranzo, P.G. 175
Soroka, V. 155
Soveta Unio 36, 115, 117, 137
Spertini, G. 118
Srilanko 117
Statuto 83
Sutton, G. 44, 102
Svane, E. 106
Svátek, V. 38
Svedio 23, 44, 67, 116
Svislando 68
Symoens, E. 67
Szerdahelyi, I. 32
Štajner, K. 73
Štimec, S. 55, 155, 187
Tago de la Lernĵo 91, 163
Teatro 21, 91, 107, 138, 154, 207
TEJO 17, 76, 93, 115, 205
Televido 107
Texier, J.-L. 125
Thatcher 119
Tikos 79
Tišljár, Z. 128
TK/Stafeto 166
Tomizza, F. 175
Tonkin, H. 81, 110, 130, 190
Tófalvi, E. 71, 167
Tradukado 5, 57, 77, 179, 198, 214, 218, 220
Trimborn, K. 173
Triolle, R. 184
Trixini 118
Tyblewski, T. 155
U.E.A.:
Estraro 2, 61, 83, 151
Komitato 83, 151
Statuto kaj regularo 83
Uline, R. 78
Umeda, Y. 58
Unesko 81, 90, 145, 162, 214
Universitatoj 21, 58, 77, 82, 118, 130, 179, 190
Unuiĝintaj Nacioj 89, 130
Usono 63
Veen, J.S. 139
Velkov, K. 55
Venezuelo 177, 137, 178
Verkistoj 8
Verloren v. Themaat, W. 13, 103, 153, 199
Vilde, E. 191
Virina agado 139, 179
Vogelmann, B. 183, 199
Vojaĝado 137
Volontula servo 84
Walden, K. 200
Walker, M. 60
Waringhien, G. 131, 202
Well, G. Van 4
Wells, J.C. 77, 82, 156
Wit, B. de 165
Witkam, A.P.N. 5
Wood, R.E. 62
Yalden, M. 146
Yamamoto, S. 214
Zairio 104, 178
Zamlinsky, C.J. 78
Zhou Shuren 131



La esplorgrupo de BSO ricevis “verdan lumon” daŭrigi la projekton **DLT** (Distribuita Lingvo-Tradukado). BSO estas eminenta nederlanda firmao en la tereno de komputilaj programaro, edukado kaj konsilado. La entrepreno nombras ĉirkaŭ 300 kunlaborantojn, okupitajn pri diversaj projektoj por la registaro kaj entreprenoj. Ĝia ĉeflaborejo estas en Utrecht, en la centro de Nederlando.

Pri **DLT** tiu ĉi revuo raportis antaŭe (januaro 1984, decembro 1982). **DLT** estas pionira sistemo por altkvalitaj tradukoj de informativaj tekstoj (angla en frâncan, ktp.) per personaj komputiloj. Destinata por la naŭdekaj jaroj kaj la sekvontaj jardekoj, ĝi utiligas novajn sciadbank-teknikojn kaj aliajn novigantajn konceptojn en la tereno de komputiloj kaj lingvoprilaborado, kaj ĝi certasence estas komparebla kun la japana Kvingeneracia Projekto.

Kvarjara prepar-, pristud- kaj plan-fazo, financita de BSO kune kun la Eŭropa Komunumo (EK), jam kondukis al iom da internacia konateco kaj evidenta aprezo en fakulrondoj.

Kuraĝigita per tio, kaj kun financa helpo el novigfondusoj de la nederlanda Ministerio de Ekonomiaj Aferoj, BSO nun komencos la multfazan konstruadon de provsistemo. Oni decidis prioritare evoluigi la lingvoparon angla-franca. En la periodo ĝis 1991, teamo de 14 kunlaborantoj (lingvistoj, tradukistoj, komputilfakuloj) okupos sin pri tio. Krome, konsilantoj el diversaj landoj partoprenos, kio pliinternaciigos la karakteron de la projekto.

En la venonta jaro, la konstruado de la moduloj Angla-IL kaj IL-Franca komenciĝos (IL estas la interna pontolingvo surbaze de Esperanto). La emfazo ĉe tio estos en la zorga kaj parte esplora kompilado de prov-vortaroj de 800 artikoloj (kapvortoj) por ĉiu el la nomitaj lingvoparoj, antaŭante la faradon de multe pli granda artikolaro en la sekvontaj fazoj. Tiurilate, BSO havas vakajn postenojn por:

1. SPECIALISTO PRI ANGLA-ESPERANTO

2. SPECIALISTO PRI ESPERANTO-FRANCA

Tiuj ĉi funkcioj necesigas denaskan uzon de la angla, respektive franca, kun perfekta regado de Esperanto, tiel aktive kiel pasive (“preskaŭ-denaske”). Universitata diplomo kun specialiĝo en la lingvistiko ĝenerala aŭ aplika estas deviga, dum ampleksa scio kaj multjara sperto en almenaŭ du el jenaj terenoj:

- praktika tradukscio
- kontrastiva sintakso
- stilistiko
- lingvostatistiko
- leksikologio

devas estigi la por tiuj ĉi funkcioj esencan bazon.

La kerno de la laboro estos la evoluigado de vortar-artikoloj kun la plejeble alta grado de *tradukprecizeco*. Ĉe tio, eventuala sperto pri vortar-verkado estos utiligenda kaj adaptenda al la specialaj postuloj de komputil-vortaroj (formaligitaj vort-elektmekanismoj), la informativa, ne-beletra teksttipo al kiu **DLT** estas direktita, kaj la de normala Esperanto iom devianta IL.

Precipe, la tasko de la dungotoj konsistos en la difinado de sencoj kaj sencgradigoj en dependeco de ilia mikro-kunteksto (apoge sur semantikaj subkategorioj de ĉirkaŭaj vortoj, verb-valentoj ktp). La por tio bezonataj senambiguig-kaj vort-elektmekanismoj, kune kun sennombraj okazoj en kiuj laŭvorta traduko ne estas ebla, donas al la vortar-artikoloj kompleksecon en kiu ankaŭ kontrastiv-sintaksaj elementoj kunludas.

Tiu ĉi amplekseco kaj solideco de vortar-artikoloj, por kiu – en kunlaborado kun eksterlanda universitato – rigida provmekanismo jam estas starigita, konsistigos gravegan kontribuon por la sukceso de la **DLT**-sistemo.

La du serĉataj kunlaborantoj devos esti kapablaj por gvida rolo ĉe la plua plivastigo de la leksikonoj far teamo de leksikografoj en la periodo 1987-1991. Tiurilate, en la periodo 1985-1986 ili devos esti kapablaj, ne nur memstare kaj pionirmaniere kompili centojn da vortar-artikoloj de granda kompleteco kaj tra-

duk-precizeco, sed ankaŭ strukturi kaj eksplicitigi sian labormetodon tiel, ke ĝi estos klare transdonebla al aliaj.

Ĉe BSO, ambaŭ dungotoj funkcios kiel “gvidantoj”, en ĉiaj problemoj (sintaksaj, morfologiaj, leksikaj, semantikaj), kiuj specife koncernas la lingvoparojn angla-Esperanto, respektive Esperanto-franca. En tiu funkcio ili kunlaboros en la **DLT**-teamo kun “ĝeneralaj” specialistoj pri la IL, terminologio, semantiko, programaro ktp. Ili ankaŭ faros kaj tenos kontaktojn kun konsilantoj aŭ aliaj personoj rilataj al **DLT**, tiel ekster kiel en la Esperanto-mondo. Krome, ili havos konsult-funkcion ĉe poste ekirigotaj paralel-projektoj pri aliaj lingvoparoj.

Sperto pri modernaj metodoj kaj evoluoj en la leksikologio (leksikaj datumbazoj, valent-vortaroj) estas rekomendo; preteco rapide orienti sin pri nova materialo estas neceso.

Alia grava okupo en la venonta jaro estos la realigo de la tiel nomata IL-kerno, la centra “vertebraro” de **DLT**. IL estas sur Esperanto bazita interlingvo, kiu distingiĝas de normala Esperanto per pli severa sintaksa reguligo, pli ampleksa diferencigo de funkciaj vortoj, pli sistema strukturado de faka terminologio ktp. La plan-principoj de IL kaj grava parto (proksimume du trionoj) de ĝia gramatika realigo jam estas findeciditaj. Kio nun sekvas, estas la finpretigo, la plua precizigo kaj formaligo de la IL-gramatiko, kaj la efektivigo de taŭgaj parsiloj kaj arbostrukturoj. Pro tio, BSO serĉas kandidaton por la posteno de:

3. SPECIALISTO PRI IL/ESPERANTO

Ĉi tiu persono respondecos pri la daŭrigo kaj finpretigo de la IL-plano, la kompilado de IL-provmaterialo, la organizado de monolingva IL-vortaro kaj multaj aliaj taskoj, en kiuj ĝisfunda regado de Esperanto kaj de IL estos centraj (malkuplite de specifa font- aŭ cel-lingvo).

Pro tio li aŭ ŝi devos havi la kapablon rapide orienti sin pri la problemaro de sintaksa ambigueco, kreive plulabori ekde la nuna stato de la IL-plano, inventari la de diversaj flankoj alportitajn solvojn, profundigi en ĉiajn detalajn problemojn ktp.

Kiel IL-specialisto ĉi tiu persono kunlaborados, sub direktado de la **DLT**-projektgvidanto, kun la (pri parsil-efektivigo respondeca) komputil-lingvisto, la lingvopar-specialistoj kaj aliaj kunlaborantoj en la **DLT**-teamo, pri terminologio, semantiko ktp. Tio ĉi antaŭsupozas la kapablon dokumenti, ilustru kaj prezenti la ĉiam kreskantan IL-gramatikon klare kaj komplete, vigle reagi al specifaj demandoj, taksu la efikon de certaj modifoj ktp.

En mezlonga tempodaŭro ĉi tiu kunlaboranto ludos gravan rolon ankaŭ ĉe la administrado de centraj facilajoj, kiel en la kadro de **DLT** starigota korpus-banko por modernaj informativaj Esperanto-tekstoj, kaj ĉe kontaktoj kun la Esperanto-mondo. En tio, la celoj de la Esperanto-movado estas klare distingendaj de la celoj en la **DLT**-projekto.

Por ĉi tiu posteno, en kiu certa supleco kaj celtrafeco estas tiel gravaj kiel analiza spirito kaj kompreno de sintaksaj konstruoj, ni pensas pri juna kaj ambicia lingvisto kun regado de pluraj lingvoj kaj ampleksa kono de Esperanto. Universitata titolo kun specialigo en la formala lingvistiko estas neceso. Sperto en lingvostatistika aŭ kontrastive-sintaksa esploro estus avantaĝo.

Kadre de solide fiksita **DLT**-arkitekturo (kun IL kiel esenca parto), kune kun firma kaj laŭcela projekt-organizo, tiuj ĉi postenoj prezentas grandan gradon de memstareco, kreiveco kaj engaĝo en teknologia frontlinio, en streĉa vetkuro por la unua daŭra kaj altkvalita perkomputila traduksistemo.

Ĉe tio, la nomo de BSO garantias modernan laborejon (progresemajn ekran-staciojn, tele-alirajn terminologio-bankojn), bonegan socian klimaton kaj allogajn dungo-kondiĉojn.

Ĉiuj tri funkcioj vakas por viroj aŭ virinoj. Nacieco de unu el la EK-landoj estas deviga. Pro la pezo de la funkcioj 1 kaj 2, la kandidatoj ne devus esti sub 35 jaroj; por funkcio 3, la aĝo estu 25-35 jaroj.

Leteroj de kandidatoj kun ampleksaj informoj (ankaŭ pri publikaĵoj) estas sendendaj al la **DLT**-projektgvidanto: Ing. A.P.M. Witkam, BSO, Poŝtfako 8348, 3503 RH Utrecht, Nederlando, kiu povas doni ankaŭ pliajn informojn; ☎ (..31-/0-) 30 911911 aŭ 20h00-22h00 ☎ (.. 31-/0-) 71 120367.



kaj aviadilo-prizorgado...

Kadre de **DLT** (vidu la du-paĝan anoncon aliloke en tiu ĉi numero) kaj pro la graveco de taŭga plivastigado de faka terminologio en tiela sistemo, BSO preparas la evoluigon de IL-provterminaro (2 000-3 000 terminoj) pri la tereno de aviadil-prizorgado, inkluzive de elektroniko (avioniko), maŝiningeniera hidraŭliko, pneŭmatiko ktp.

Tiu ĉi terminaro estas farenda laŭ la specifaj gvidiloj jam ellaboritaj por la IL (la interna interlingvo) de **DLT**, kiuj distingiĝas per forta normigemo, naturalismaj radikoj, skemismaj afiksoj kaj certa pliprecizigo de la afiksaro. Tiurilate, BSO serĉas kunlaboron de:

ASISTANTO POR TEKNIKA TERMINOLOGIO

por limigita kontrakt-periodo de 9 monatoj (ĉe 40-hora laborsemajno).

Lia ĉiutaga tasko estos ellaborado de IL-ekvivalentoj, laŭ la **DLT**-gvidiloj kaj deirante de anglaj (ofte ankaŭ francaj aŭ alilingvaj) fakterminoj. Ĉio ĉi funkcios kiel praktika realisma ekzercado, ĉar ĝi parte koncernos tre specialajn kaj tute novajn teknikajn nociojn, kiuj ne jam esperantiĝis.

Pro tio, ne nur sufiĉa kono de Esperanto, de la angla kaj franca, sed ankaŭ teknika sperto aŭ eduko, kun bona kompreno de la signifo kaj uzo de fakaj terminoj en la supre menciita tereno, estos esencaj. Sperto en esperantaj terminologio-projektoj estus avantaĝo.

Kvankam tiun ĉi postenon karakterizas produktado – ne esploro – tamen la termin-farado ebligas certan gradon de kreiveco kaj originaleco. Krom tio, kelktempe kunlabori pri **DLT** en la esplorgrupo de BSO povas esti alloga ŝanco por ekz. altlerneja staĝanto.

Leteroj de kandidatoj por tiu ĉi posteno de limigita daŭro estas sendendaj al la ĉefterminologo de la **DLT**-teamo: Lic. A.L.M.P. Olde Kalter, BSO, Poŝtfako 8348, 3503 RH Utrecht. Nederlando, kiu ankaŭ povas doni pliajn informojn; ☎ (...31-/0-) 30 911911 aŭ 20h00 – 22h00 ☎ (...31-/0-) 30 949719.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Delegitoj! La ĉefdelegitoj nun kolektas la ŝanĝojn en la delegita reto por 1985. Se necesas ŝanĝi ion ĉe via enskribo, bv. nun komuniki tion al via ĉefdelegito aŭ al la CO ĝis la 1-a de januaro 1985.

28-jara japana komencanto, loĝanta en Islando, deziras korespondi. S-ro Shin-suke Kunimune, Pósthólf 293, IS-400 Isafjörður, Islando.

25-jara infaninstruistino, patrino de unu infano, deziras korespondi pri kaktoj, sporto, muziko kaj turismo. S-ino Tina Jonovska, Kiril i Metodi 25, Bl. N. Rilski G-5, BG-7004 Ruse, Bulgario.

En Gambio, okcidenta Afriko, komencis instrui Esperanton juna brita instruisto. Dekoj da gejunuloj nun alproksimiĝas al korespondkapablo. Ĉu iu Esper-

anto-klubo kolektive "ĝemeliĝos" kun ili? Ankaŭ unuopuloj bonvenas. Skribu al s-ro Ian White, St. Augustine's High School, P.O. Box 463, Banjul, Gambio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Fiera Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Terminaron pri briĝo deziras kompili konata briĝ-aŭtoro. Proponojn pri kunlaboro sendu al s-ro Allan K. Simon, 1339 Hamilton St. NW, Calgary, Alberta T2N 3W8, Kanado.

UEA-DM-Akirasocio: Fariĝu vialanda peranto. Petu ĝian regularon kontraŭ du irk-oj. S-ro G. Vaske, Rua Esperanto S/N, BR-95760 Caí (RS), Brazilo.

Finna pentristo-reklamgrafikisto volas interŝanĝi ekslibrisojn tra la tuta mondo. Ankaŭ projektas tiajn. S-ro Lennart Heinoja, Uudenmaankatu 12a A 29, SF-20500 Turku, Finnlando.

Sylvio Malheiros, Rio, skribu al Karl L. Sherwood, 2717 Curtis Drive, Amarillo, Texas 79109, Usono.

Ses junaj nikaragvanoj petas por sia nova Esperanto-klubo ĉiajn materialojn por disvastigi la lingvon, ankaŭ poŝtmarkojn, al s-ro Eddy Silva Molina (Esperanto-klubo), Ciudad Jardin M46, Managua, Nikaragvo.

Mi preparas disertacion pri interlingvistikaj konceptoj ekde 1945. Mi bezonas ĉiajn interlingvistikajn periodaĵojn, artikolojn, librojn, lingvoprojektojn ks. Rekompenco laŭ interkonsento. S-ro A. Melnikov, a. ja. 393, SU-344007 Rostov-Don, Sovetunio.

Deziras serioze korespondi tutmonde 25-jara fraŭlo, lingvisto, s-ro Sergej Jakaulej, per. 8 Marto 16, SU-210002 Vitebsk, Sovetunio.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj s-ro Dieter Kremp, Kastellstr. 17, D-7500 Karlsruhe 41, FR Germanio.

Juna togolandano Foley A. Ekué, B.P. 13528, Lomé-Nyekonakpoe, entuziasme lernas Esperanton, jam atinginte bazan lingvoscion. Li laboras pri elektroniko kaj vespere studas por iĝi radio-televida teknikisto. Li deziras korespondi pri sia fako kaj se eble ricevi kelkajn fakajn materialojn donace.



Koresponda Servo
Mondskala de UEA

Jus aperis nova informilo ĉe UEA: *Kiel mi povas uzi Esperanton?* Ĝi donas konsilojn al kursanoj en simpla Esperanto. Ĝi informas pri radiostacioj, libroj, renkontiĝoj kaj ĉefe pri nia koresponda servo. En la informilo estas demandaro, per kiu peti korespondamikojn, Petu la informilon de la Centra Oficejo aŭ ĉe: KSM, p/a. R. Llorens, 121 bis, Bd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.



Language Problems & Language Planning

LPLP estas la nura revuo dediĉita al progresigo de la interkompreniĝo kaj solvo de la lingvorilataj problemoj pere de novevoluanta disciplino de la lingvo-planado. La revuo publikigas artikolojn, tiel teoriajn kiel praktikajn, kiuj konsideras politikajn kaj sociologiajn aspektojn de lingvoj en diversaj geografiaj regionoj. La artikoloj povas aperi en iu ajn lingvo, kun resumo en Esperanto. **LPLP** aperas sub la aŭspicioj de Centro de Esploroj kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (instanco de UEA).

La revuon eldonas trifoje jare: University of Texas Press, P.O.Box 7819, Austin, Texas 78713, Usono. La abontarifoj estas: US\$27 (por institucioj) aŭ US\$15 (por individuaj abonantoj) jare. **LPLP estas abonebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA.**

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

Esperanto und Wissenschaft Zur Plansprachenproblematik de Detlev Blanke

Elstara informilo por lingvosciencistoj. Informriĉa germanlingva skizo, kiu science traktas planlingvojn, interlingvistikon, la planlingvon Esperanto, kun bibliografioj de sciencaj verkoj.

Eld. Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Berlino, 1982 (represo). 88p. 21cm. Prezo: 12,00 gld. de la sola distribuantaro Libroservo de UEA (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

RADIOTEKNIKA ARTIKOLARO

- ★ 23 altnivelaj fakaj artikoloj pri tre diversaj radio-teknikaj temoj
- ★ abunde ilustrita per fakaj figuroj kaj grafikaĵoj
- ★ kun terminareto kaj listo de eldonaĵoj
- ★ 64 paĝoj, plus 20 paĝoj da fakaj anoncoj

Redaktis László Szilvási. Eldonis Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto, 1984. 24cm. ISBN 963 571 166 6. Prezo: 7,50 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



volumo 5

- * 17 studoj de diverslandaj fakuloj
- * mapoj, figuroj, grafikaĵoj kaj tabeloj
- * 172 paĝoj, kun 83 paĝoj da fakaj anoncoj
- * suplementa faka tabelaro

Redaktis Endre Dudich. Eldonis Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto, 1984. 21cm. ISBN 963 571 123 9. Prezo: 9,00 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

internacia magazino sendependa

MONATO

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

MEMORAĴOJ PRI VANKUVERO

"Komunikado" de
Jim Gilbert



Glumarkoj (folio po 35)	Kan. \$ 1,90 aŭ 3 irpk*
Kongresa broĉo, stan-aloja	Kan. \$ 3,20 aŭ 5 irpk
Kongresa broĉo, arĝenta	Kan. \$ 9,60 aŭ 15 irpk
Te-kulero kun kongresa emblemo	Kan. \$ 4,50 aŭ 7 irpk
Kantlibro: "Kantu Kanade"	Kan. \$ 3,20 aŭ 5 irpk
Indiana grafikaĵo "Komunikado"	Kan. \$ 14,00 aŭ 22 irpk

* irpk = Internacia Respondkupono. Sendokostoj estas inkluzivitaj.

"Kantu Kanade" – speciale tradukita por la 69-a UK de sperta muzikisto kaj sprita tradukisto. Instruas pri la historio de Kanado. Vera raraĵo.

"Komunikado" – limigita eldonkvanto de 300 4-koloraj ekz-oj kun la subskribo de la indiana artisto. Aperis sur la kovrilo de la Kongresa Libro. Kun dupaĝa Esperanta klarigo pri la indianaj simboloj.

Sendu jarfinan donacon! Skribu preslitere la nomon kaj adreson de la ricevonto. Ni enmetos donackarton kun via nomo.

Mendu de: Esperanto, P.O. Box 2159, Sidney B.C. V8L 3S3, Kanado

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO KASTELO GRÉSILLON

Kulturaj aranĝoj 1985

Internacia Renkontiĝo de Infanoj, 31 marto-6 apr.: kursoj, redaktado de staĝgazeto, distraĵoj, diskutrondo pri lingvo-instruado kaj enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Neformala Internacia Renkontiĝo, 16-30 junio: La programo estos fiksita surloke laŭ la deziroj de la ĉeestantoj; kursoj, konversaciaj rondoj, promendoj, ekskursoj aŭ nur ripozi.

Prelegoj kaj kursoj, 30 jun.-21 jul.: prelegoj, konversacioj, seminario pri rektmetoda instruado, diversnivelaĵoj kursoj, malkovro de la regiono.

Kursoj, 22 jul.-11 aŭg.: kursoj diversnivelaĵoj, konversacioj, teatro, artlaboroj, malkovro de la regiono.

Kursoj, 11 aŭg.-1 sept.: kursoj trinivelaĵoj, malkovro de la regiono.

Informadiko per kaj por Esperanto, 11-24 aŭg.: komencado kaj praktikado.

Renkontiĝo de Blindaj kaj Neblindaj Esperantistoj, 18 aŭg.-1 sept.: organizata de FUBE, komunaj kulturaj aranĝoj, trejnado por tradukado, gvidota de R. Gonin.

Informoj kaj aliĝoj ĉe Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon, F-49150 Bauge, Francio.



La longe atendita legolibro por progresantoj

- komisiita de UEA
- ideala por memlernantoj kaj gvidantoj de progresigaj kursoj
- de la fama verkistino

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

- ★ ekzercigas pri frazkonstruado
- ★ kreskigas skrib- kaj parolkapablon
- ★ pligrandigas la vortostokon de la leganto
- ★ uzas simplan stilon en 52 variaĵoj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).